MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

HUNGARA VIVO

2
1986
16,- Ft

Pri programoj por via libera tempo, pri enlandaj ripozebloj, pri kulturaj eventoj informas Vin

Turisma Informservo TOURINFORM per la telefonnumero 179-800, aŭ persone en la Oficejo TOURINFORM (Budapest, V., Petőfi Sándor u. 17/19./

TOURINFORM:

INFORMOJ PRI MULTAJ LOKOJ EN UNU LOKO

- Reguloj pri dogano, devizoj, pasporto, vizoj; limtrapasejoj
- Adreso kaj telefonnumeroj de vojaĝagentejoj, turismaj oficejoj, hotelaj kaj restoraciaj entreprenoj
- Restoracioj, trinkejoj, amuzejoj
- Muzeoj, artmemoraĵoj, naturprotektaj teritorioj
- Kuracbanejoj, plaĝoj
- Vojaĝoj per fervojo, sur ŝoseo, en aero
- Speciala meteorologia servo
- Poŝtaj servoj

		Per telefono	Persone
En la lingvoj hungara,	labortage	7-21 h	8-20 h
germana, angla,	sabate	7-20 h	8-20 h
rusa kaj franca	dimanĉe	8-13 h	8-13 h

Felelős szerkesztő: Benczik Vilmos. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség. Felelős kiadó: Vaskó Tibor. Készült a Magyar Eszperantó Szövetség Házi Sokszorosítójában. Felelős vezető: Szabó Imre. Budapest, 1985. július. Törzsszám: hearota 85-0215. Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkézbesítő postahivatalnál, a Posta hírlapüzleteiben ös a Posta Központi Hírlap Irodánál (KHI) Budapest V. József nádor tér 1. 1900, közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a KHI 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra. Előfizetési díj 1 évre 96,- Ft , fél évre 48,- Ft (külföldi címre 114,- ill. 57,- Ft). Egyes szám ára 16,- Ft. Megjelenik kéthavonta.

SINDIKATA MOVADO EN HUNGARIO

La sindikatoj estas en Hungario sendube la plej ampleksa amasorganizaĵo: funkcias en nia lando entute 19 sindikatoj kun la suma membraro de 4,5 milionoj. Tio signifas, ke ĉ. 90% de ĉiuj dungitoj membras en iu sindikata organizaĵo.

La hungara sindikata movado estas unueca: la 19 sindikatoj — ĉiu el ili unuiganta la sindikatanojn de difinitaj profesioj — laboras enkadre de strikta federacio. La kongreso de la opaj sindikatoj delegas membrojn — proporcie al sia propra membronombro — al la Nacia Konsilio de Sindikatoj, kiu inter du sindikataj kongresoj (okazantaj en ĉiu kvina jaro) estas la plej supera organo de la hungara sindikata movado. Tiu Konsilio konsistas ordinare el 250-300 membroj.

POR LA INTERESO DE LA LABORULOJ

La hungara sindikata movado plenumas multfacetan laboron, en kiu kompreneble havas la ĉefan emfazon la protektado de la interesoj kaj rajtoj de la laboruloj. La elektitaj oficuloj de la sindikataj organizaĵoj sur ĉiu nivelo havas vastajn, leĝe garantiatajn eblojn kaj rimedojn por adekvate plenumi tiun taskon. Tiuj rimedoj ekzistas ankaŭ sur la plej alta nivelo: la reprezentantoj de la Nacia Konsilio de Sindikatoj ofte renkontiĝas kun la reprezentantoj de la registaro por pritrakti la aktualajn problemojn: tiamaniere la hungaraj sindikatoj povas efike influi la ekonomian politikon de la registaro.

Cetere, la kunlaborado inter la sindikatoj kaj la ŝtataj organoj en Hungario estas harmonia, sed tiu harmonio kompreneble ne ekskludas la eblon de diskutoj. Tiaj diskutoj fakte okazas, malgraŭ la fakto, ke kaj la registaro, kaj la sindikatoj laboras por la sama celo: por la konstanta plibonigo de la vivkondiĉoj de la civitanoj. Tamen, en konkretaj kazoj povas montriĝi diferencoj inter la ĉefaj vidpunktoj kaj emfazoj de la registaro kaj la sindikatoj.

Speciala formo de la ĉi-terena sindikata laboro estas la *sindikata jura servo.* Tiu ĉi servo donas konsilojn al la laboruloj en laborjuraj demandoj, kaj se necese, ĝi ankaŭ ekprocesas kontraŭ la entreprenо aŭ ajna ŝtata organo por validigi la rajtojn kaj intere-

Béla Kevevári transprenas de Sándor Gáspár la „Ordenon 4a de Aprilo"

Sándor Gáspár parolas en la ĉijara sindikata kongreso

sojn de la laboruloj. Estas emfazinde, ke tiu ĉi servo de la sindikatoj al siaj membroj estas *senpaga.*

SOCIALAJ TASKOJ

La sindikatoj plenumas tre gravan laboron ankaŭ sur la kampo de la sociala prizorgado. La sindikataj organizaĵoj donas *aŭtomatan monhelpon* al siaj membroj ĉe naskiĝo de infano, morto de familiano ktp. Alia kategorio de la monhelpoj estas asignata laŭ la socialaj cirkonstancoj de la membroj: ekz. multinfanaj familioj ricevas monhelpon ĉe la komenco de nova lernojaro. La sindikataj organizaĵoj donas gravan atenton ankaŭ al tiuj siaj membroj, kiuj ne plu estas aktivaj laboruloj: ĉefe okaze de la jarfino estas asignataj monhelpoj al tiuj emeritoj, kies pensioj ne atingas la averaĝan nivelon.

Eble la plej populara sociala sevo de la sindikatoj estas la vastaj ebloj de *favorpreza feriado.* Tio okazas ĉefe en feridomoj, kiujn la registaro transdonis al la sindikatoj tiucele, sed la sindikataj organizaĵoj ankaŭ mem konstruigis kaj konstruigas tiajn feridomojn.

KULTURA AGADO

En Hungario la sindikata movado estas tradicia kadro de la laborista kulturo. Funkcias tre multaj sindikataj kulturdomoj, bibliotekoj, kinejoj, laborlokaj kulturaj kluboj. La sindikataj organizaĵoj subtenas la agadon de tiuj kulturaj institucioj per signifaj subvencioj.

Ĉi tie ni devas memorigi, ke Hungara Esperanto-Asocio, ekde sia fondiĝo fine de la jaro 1960, laboras helpate de la hungara sindikata movado. Tiu kunligiĝo de la sindikata kaj esperantista movadoj havas historiajn radikojn en Hungario: jam dum la intermilita periodo la Esperanto-agado estis grava ero de la laboristkultura movado.

Dum la lasta kvarona jarcento la hungara Esperanto-movado ricevis netakseble grandan helpon de la sindikata movado, kiu manifestiĝas ankaŭ per signifa mona subvencio. Tian subvencion ricevas ne nur HEA mem, sed ankaŭ ĝiaj departementaj organoj.

Tiu helpo kulminis ĉefe lige kun la du Universalaj Kongresoj (1966 kaj 1983) kiuj okazis dum la koncerna periodo en Hungario. Tiam la Nacia Konsilio de Sindikatoj uzis sian plenan aŭtoritaton por sukcesigi la laborojn de LKK.

Pro tio estis aparta ĝojo por ni, ke Béla *Kevevári*, funkciulo de la NaciaKonsilio, kiu ekde la komenco konkrete estas ŝarĝita pri la subteno de la agado de la hungaraj esperantistoj, antaŭ kelka tempo ricevis la altan ŝtatan distingon *Ordeno de la 4a de Aprilo* pro sia elstara laboro.

EKSTERLANDA PRESTIĜO

La hungara sindikata mvado havas altan prestiĝon ne nur en Hungario, sed ankaŭ eksterlande. Bele demonstras tion la fakto, ke Sándor *Gáspár*, kiu depost tri jardekoj estas elstara gvidanto de la hungara sindikata movado, antaŭ kelkaj jaroj elektiĝis ankaŭ prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj — tio signifas rekonon ne nur al liaj personaj kvalitoj, sed ankaŭ al ĉiuj hungaraj sindikataj organizaĵoj kaj iliaj membroj.

Vilmos *Benczik*

kulturado en la esperanto-grupoj

La radikoj de la kulturado de plenkreskuloj en nia lando troviĝas jam en la fino de la 18a jarcento, en la epoko de la klerismo. La memklerigado de plenkreskuloj jam en la komenco elformis siajn specialajn komunumajn formojn. El inter ili la plej ŝatataj estis la legorondoj kaj amatoraj artaj grupoj. La manufakturo kaj poste la fabrika industrio, kaj la samtempe elformiĝinta laborista movado jam pretendis pli klerajn laboristojn, aliflanke pro la ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj ankaŭ la individuoj klopodis alproprigi la necesajn konojn, kapablojn. Krome la kultura politiko de la ŝtato favore influis la elformiĝon kaj evoluon de la klerigaj movadoj.

Elformis siajn grupojn ankaŭ tiuj, kiu volis agadi por la kontentigo de la pretendo pri komuna lingvo de la homaro, nature inter cirkonstancoj multe pli komplikaj ol la ĉi-supre skizitaj. Ili povis fari tion ankaŭ tial, ĉar en 1879 aperis Volapük, kiu el la ĝis tiam aperintaj kelkcent lingvoprojektoj, eĉ se malfacile, tamen estis parolebla.

En la sekva periodo la diversnacianoj kiuj lernis Esperanton el la unue en 1887 aperinta ruslingva, kaj poste pollingve, germanlingve, franclingve presitaj lernolibroj, jam komprenis unu la alian. De la jarcentŝanĝiĝo kreskis la nombro de Esperanto-grupoj, rondoj, societoj en tuta Eŭropo. Jam en la unuaj monatoj post la fondiĝo evidentiĝis, ke sen regula kaj ampleksa klerigado la grupoj ne povas atingi la celon: la disvastigon de la Internacia Lingvo. Do ekiris tiu procezo, kies rezulto estis, ke la esperantistaj grupoj, eĉ malgraŭ la abundaj sociaj kaj reĝimŝanĝoj povis adaptiĝi al la cirkonstancoj.

En Hungario la plimulto de la Esperanto-grupoj funkcias en konsilantara kaj sindikata kulturdomoj. El la ŝtata kaj entreprena buĝeto la kultura agado ricevas konsiderindan parton en ĉiu jaro. El tiu sumo ankaŭ la kulturdomoj ricevas financajn subtenojn, sed la plej multon ricevas tiuj, kies agado plej bone kongruas kun la direkto de la kulturpolitiko.

Ĉiu membro de Hungara Esperanto-Asocio apartenas al iu grupo, kiu povas esti laborloka, loĝloka (kune: loka), aŭ faka, kiu grupigas la samfakulojn.

La interesiĝo de la lokaj grupoj plej ofte estas ĝenerala, nur la sameco de la laborloko aŭ loĝloko kaj nature Esperanto kunligas ilin. La anoj de tiuj grupoj laŭ aĝo, profesio, interesiĝo estas diversaj.

Grupoj kun speciala interesiĝo povas esti:

a/ laŭ profesio: fervojista, poŝtista, kooperativa, pedagoga, sanitara, komputista, ekonomikista, klerigista ktp.

b/ laŭ ceteraj samecoj: grupo de blinduloj, handikapuloj ktp.

c/ laŭ libertempaj ŝatokupoj: grupo de turistoj, filatelistoj, radioamatoroj ktp.

La plimulto de la grupoj laŭ speciala interesiĝo estas envicigebla en iun el la supraj kategorioj, tamen pro la kresko de interesdiverseco, tiu klasifikado jam estas ampleksigebla.

Sed estas kvalitaj diferencoj ankaŭ inter la grupoj kun speciala interesiĝo. Ekzemple la interesiĝ-sameco estas pli evidenta en la grupoj de samfakuloj, ol ekzemple en la grupo de turistoj.

La grupoj laŭ aĝo povas esti:

a/ Grupoj de diversaĝuloj. Al ili povas aparteni grupoj kun ĝenerala kaj kun speciala interesiĝo.

b/ Grupoj de samaĝuloj: junpioniroj, mezlernejanoj ktp.

La klasifikon nature oni povas daŭrigi ankaŭ laŭ aliaj vidpunktoj, sed por la hungaraj Esperanto-grupoj la menciitaj ŝajnas la plej konvenaj.

La konsisto de la grupoj fundamente determinas ilian agadon, kaj ankaŭ la projekteblajn kaj atingeblajn celojn.

En ĉiu Esperanto-grupo okazas lernado de la lingvo. Troviĝas grupoj, kie la lingvolernado okazas aparte, en aliaj grupoj la lingvolernado kaj la konatiĝo kun Esperanto okazas en la kadroj de la kutimaj kunvenoj. Aliaj grupoj enmetas en la grupprogramojn konversaciajn kaj progresigajn partojn de la lernado de Esperanto.

La programoj de la grupoj estas variaj. Parto donas nur amuzon, refreŝiĝon, alia parto samtempe amuzas, kulturas kaj edukas. Sed parto de la programoj intencas konscie eduki.

Kiel ekzemplon, ni rigardu la jaran programon de kvin bone funkciantaj grupoj, kiuj apartenas al la kategorio de „ĝenerala interesiĝo". Tiuj grupoj kunvenas unufoje en ĉiu semajno, escepte la somerajn monatojn kaj la festotagojn. Tiel entute ĉe la kvin grupoj okazis 151 kunvenoj en unu jaro. La konsisto de la programoj aspektas jene:

Rememoro pri esperantistoj: 6-foje (4%)
Rememoro pri hungaraj datrevenoj: 10-foje (7%)
Organiza vivo: 16-foje (10%)
Libera programo: 4-foje (3%)
Amuziĝo (balo): 10-foje (7%)
Lingvoekzerco, pluevoluigo 16-foje (10%)
Interesaj temoj (prelegoj kun aŭ sen diapozitivoj): 58-foje (38%)
Popularsciencaj prelegoj: 31-foje (21%)

Unue okulfrapas la granda mobro de „interesaj temoj". Ili ne estas pro iu kaŭzo aktualaj temoj, sed raportoj pri vojaĝoj de la prelegantoj en diversaj landoj, urboj laŭ la propraj travivaĵoj. El la 58 prelegoj 37 estis ilustritaj per diapozitivoj. La 31 mallongaj popularsciencaj prelegoj okupiĝis pri diversaj interesaĵoj en la mondo. Parto el ili estas konsiderebla kiel scienca prelego.

Do, entute 89-foje (59%) okazis diversnivelaj scienco-popularigaj prelegoj. Ankaŭ la 16 lingvoinstruaj kunvenoj iom estas vicigeblaj en tiun kategorion, ja ankaŭ tie okazis transdono kaj alproprigo de konoj, kio ne estas nur pasiva akceptado sed aktiva partopreno.

La restanta triono konsistas el kvar prototipoj. La grupoj kun „ĝenerala interesiĝo" pro la diverseco de la anoj klopodas doni grandan sortimenton de programoj, tiamaniere kreante bazon por la multfaceta klerigado.

La plimulto de la grupoj por la samaj interesiĝantoj kunvenas en ĉiu dua semajno. Tie okazas sciencaj prelegoj, kaj pridiskuto de la sciencorganizadaj kaj movadaj aferoj. La lingva nivelo de tiuj grupoj ĝenerale estas pli alta, ol tiu de la ĝeneralaj grupoj, tial ili ofte altiras anojn el la ceteraj grupoj.

Edukeblecoj en la Esperanto-grupoj

Estas sciate: tiu, kiu lernas lingvon, samtempe konatiĝas kun du lingvoj: kun la elektita fremda lingvo, kaj kun sia gepatra lingvo. La alproprigo de fremda lingvo bezonas ankaŭ la konon de la strukturo kaj de la funkciadreguloj de la propra gepatra lingvo. Aliflanke, la lingvolernado evoluigas ankaŭ la tuton de la intelektaj kapabloj, ja la evoluigo de legkapablo, esprimkapablo, memorkapablo bone efikas je la evoluo de la personeco.

La lingvolernado bezonas la ekkonon de certaj skribitaj kaj parolitaj materialoj. Post la trapaso de la komencaj paŝoj, la elekto de la tekstoj por la ekzercado ebligas ,,akcesore'' ankaŭ la alproprigon de multspecaj konoj de sociologio, historio, arto. Por la lingvoekzercado la grupoj organizas diversajn esperantlingvajn programojn: prelegojn, paroladojn, renkontiĝojn, travivaĵraportojn ktp. Tiuj programoj ebligas ankaŭ la evoluigon de ĝenerala kaj faka kulturo, la ekkonon de la valoroj de la nacia kaj universala kulturo.

La konoj aŭskultataj dum la popularsciencaj prelegoj — krom la altigo de la nivelo de la lingvoscio — evoluigas ankaŭ la klerecon de la aŭskultantoj. Tiun gravan eblecon la grupoj ne ĉiam eluzas por edukada celo kaj por klerigado. La vicordo de la unuopaj prelegoj ofte dependas nur de hazardo, pro tio ili ne havas kontaktpunktojn, ili ne efikas kontentige je la klerigo de la aŭskultantaro. Malgraŭ tio, la ĉiumonataj kelkaj prelegoj havas du konkretajn rezultojn: a) ke la ĝenerala kulturiteco, orientiĝo de la aŭskultantaro ade evoluas; b) ke la vasta gamo de la prelegoj vekas kaj larĝigas la interesiĝon.

La korespondado, kiel ilo de la evoluigo de la lingvoscio, kaj ilo 'por elformi kaj flegi internaciajn kontaktojn, okazas en ĉiu grupo. Krom la engrupa lingvopraktikado, la novaj esperantistoj ankaŭ tiamaniere volas provi la funkcikapablon de la lingvo, tial ili komencas korespondadi ĉefe kun eksterlandanoj. Post la paso de la tempo la temoskalo de la korespondadoj larĝiĝas, kaj depende de la persona interesiĝo, la korespondantoj ekkonas la kulturon, la kutimojn de la popolo de la korespondamiko.

El inter tiuj, kiuj ellernis Esperanton, troviĝas multaj, kuj — pro la sukcesa lingvolernado — ekhavas emon por ellerni ankaŭ aliajn fremdajn lingvojn, ili aŭ refreŝigas, pluevoluigas la antaŭan lingvokonon, aŭ ellernas plian lingvon. Ili ĉiuj klarigas siaŭ intencon tiel, ke per Esperanto ili ellernis la manieron de la lingvolernado. Do, Esperanto rezultplene estas uzebla ankaŭ kiel lingva modelo.

En ĉiu grupo estas konstanta programo rememori pri diversaj okazintaĵoj kaj personoj, kunlige kun datrevenoj. La rememoroj per Esperanto helpas la realan historiokonsideron de la anaro; la studado de la pasinteco, la transpreno de ĝiaj spertoj, rezultoj estas nemalhaveble grava por la planado de la futuro. Krome la memorfestoj starigas imitindajn modelojn por la aŭskultantaro, samtempe fortigas ilian identeco-scion.

La rememoro pri la naciaj kaj laborist-movadaj festoj, krom la menciitaj, edukas unuavice ankaŭ je patriotismo kaj internaciismo.

La komune pasigita libera tempo estas elstara ebleco por transpreno kaj transdono de modeloj de konduta kaj vivmaniero. Tiu formo precipe ebligas la evoluigon de la komunuma sento. Krome la programoj havas ankaŭ specialajn rilatojn. Ekzemple dum ekskursoj ĉefe la korpa edukado estas la celo, sed nenio malhelpas ankaŭ ekzerci Esperanton. La rememoro pri datrevenoj povas esti ilo por la komunuma edukado.

La Esperanto-grupoj ekzercas la organizan vivon. Kiel bazorganizaĵoj de Hungara Esperanto-Asocio ili havas rajtojn kaj devojn, estas gvidantoj kaj gvidatoj, direktas, plenumas, voĉdonas, ekzercas tiujn agadojn, kiuj evoluigas la kapablojn por la plenumo de komununa agado.

La klerigadaj instancoj distinge apogas la komunumojn, la estigon de komunumoj, kaj la kulturajn agadojn en la komunumoj. La vortoj ,,grupo'' kaj ,,komunumo'' oni uzas en la ĉiutaga vivo ofte malsame. Laŭ nia difino ,,komunumo'':

a/ konscie agadas por la plenumo de la planitaj celoj,

b/ iliaj celoj kaj streboj estas la samaj, kiel tiuj de la asocio,

c/ agadas laŭ interna disciplino kaj organiziteco.

El la priskribo de la agado de la grupoj ni povis vidi, ke ili agadas laŭ la spirito de la asocio, do la plimulto el ili plenumas la postulaĵojn de la punktoj,,a'' kaj,,b''.

Laŭ niaj spertoj, la postulaĵon de punkto,,c'' ne ĉiu grupo plenumas; ofte mankas la disciplino en la plenumado de la akceptitaj taskoj, ne funkcias bone la demokratiaj forumoj, parte pro la manko de konoj, necesaj por la gvidado, parte pro la aŭtoritatemaj gvidmetodoj. Kiel portantoj de malmodernaj vidpunktoj, opinioj, ili ne povas evoluigi la grupon je renoviĝo, progreso kaj komunumo.

La plimulto de la Esperanto-grupoj ankaŭ nuntempe funkcias kiel komunumo, konvene al la supre menciitaj bazaj postuloj. La novaj grupoj povas fariĝi komunumoj, ĉar la celoj de la asocio kaj movado instigas ilin al tio.

Oszkár *Princz*

Amika babilado en Esperanto-grupo

(Foto de Z. Fejér)



D-ro Vilmos Sághy kaj d-ro Ottó Haszpra (Foto de Z. Fejér)

La 19an kaj 20an de aprilo kunsidis en la sidejo de la Nacia Konsilio de Sindikatoj la Jarkunveno de HEA. Al la Jarkunveno venis la delegitoj de la lokaj grupoj de la Asocio, la membroj de ĝia Komitato, kaj ankaŭ la reprezentantoj de ĉiuj gravaj sociaj kaj politikaj organizaĵoj de Hungario. La Nacian Konsilion de Hungaraj Sindikatoj reprezentis ĝia vicprezidanto Károly *Palotai*, kiu trasdonis sindikatan distingon al kvar esperantistoj: la oran gradon de la **„Ordeno pro Sindikata Laboro"** ricevis d-ro Endre *Baráth* kaj Alfonz *Pechan*, la arĝentan gradon de la sama distingo d-ro Vilmos *Benczik* kaj Zsolt *Gyarmati*.

La Estraro de Hungara Esperanto-Asocio donacis la medalon **Pro Esperanto"** al Árpád *Abonyi*, Ervin *Fenyvesi*, János *Ingusz*, Istvánné *Tóth*, Sándor *Szelezsán* kaj Milan *Zvara*. La **„Honoran Insignon de Hungara Esperanto-Asocio"** ricevis István *Bálint*, d-ro József *Fülöp*, Ferenc *Jáki*, József *Kaptay* kaj Péter *Tihanyi*.

La Jarkunveno elektis kiel **honorajn prezidantojn de HEA** d-ron Ferenc *Nezvál* kaj d-ron István *Bácskai*. **Honoraj membroj de HEA** estis elektitaj Szilárd *Bálint*, Károly *Fajszi*, István *Füzesi*, Endre *Gimes*, Lajos *Kapitány*, Lajos *Korsós*, József *Mátyás*, Jenő *Molnár*, Aurél *Ponori-Thewrewk* kaj Márta *Vári*.

Hungara Esperanto-Asocio rikoltis ne malmultajn sukcesojn dum la lastaj kvin jaroj, tamen pri la raporto de la Estraro disvolviĝis en la Jarkunveno vasta diskuto. En tiu diskuto abundis kritikaj elementoj, kiuj riproĉis la Estraron unuavice pro ĝia ne sufiĉe demokratia laborstilo. Tiuj kritikoj decide influis la delegitojn ĉe la elekto de la nova 75-membra Komitato: pluraj pli fruaj gvidantoj de HEA — interalie la ĝenerala sekretario, unu el la vicprezidantoj kaj la sekretario — ne estis elektitaj komitatanoj, kvankam ili estis kandidatigitaj.

La nove elektita Komitato kunsidis la 26an de aprilo por elekti la novan 19-membran Estraron (la novaj membroj kursive): *Zsófia Baross-Kórody, Zsuzsa Barcsay*, d-ro Vilmos Benczik, *d-ro Péter Broczkó, Endre Csiszár, d-ro Endre Dudich, Katalin Faragó, Mihály Gergely, Zsolt Gyarmati, József Halász*, d-ro Ottó Haszpra, *Sándor Hideg, Márton Lengyel*, d-ro Árpád Máthé, d-ro József Pál, *Oszkár Princz*, d-ro Árpád Rátkai, *d-ro Vilmos Sághy, d-ro István Szerdahelyi*.

Kiel estas videble, nur kvin membroj de la nova estraro membris ankaŭ en la antaŭa.

La nova Estraro en sia unua kunsido elektis prezidanto de HEA d-ron Vilmos *Sághy*, kiu dum pluraj jardekoj oficis en altaj ŝtataj postenoj, kaj emeritiĝis kiel ministro pri interna komerco. Li havis gravan rolon en tio, ke la Monda Turisma Organizo en sia konferenco en Manila faris rekomendon kiu instigas por la ekuzo de Esperanto en la internacia turismo. Ĝenerala sekretario de HEA estis elektita d-ro József *Pál*, kiu oficas ankaŭ kiel sekretario de la Nacia Kooperativa Konsilio. Vicprezidantoj de HEA estis elektitaj d-ro Ottó *Haszpra*, d-ro Árpád *Máthé*, d-ro Árpád *Rátkai* kaj d-ro István *Szerdahelyi*.

Hungara Esperanto-Asocio kun refreŝigitaj fortoj alfrontas la Jubilean Jaron: nia Redakcio deziras al la nova Estraro, ke ĝi disvolvu siajn energiojn en la intereso de la plua disvastigo de la Internacia Lingvo!

Julio Baghy (1891-1967) estis unu el la grandformataj personecoj ne nur de la Esperanta literaturo, sed ankaŭ de la centjara historio de la Esperanto-movado. Li estas konata kiel personeco esence emocia, sed kiel ankaŭ la antaŭ nelonge aperinta monografio de Marjorie Boulton („Poeto fajrakora — sed ne fajrakora nur") demonstras, tio estis nur unu faceto de lia profilo.

Li restas ĝis nun unu el la plej legataj Esperantaj romanistoj. „Hura!" estas lia plej ampleksa romano — interesa kaj ĝis nun leginda sintezo de satiro kaj filozofio. Tiu ĉi romano aperis en la jaro 1930, kaj tial la nuntempa publiko ne konas ĝin. Post pli ol duona jarcento Hungara Esperanto-Asocio decidis reeldoni ĝin, kun ampleksa postparolo, kiu detale analizas la virtojn kaj mankojn de tiu ĉi neŝablona romano, kiu ankaŭ nuntempe montriĝas amuza kaj pensiga legaĵo.

Jen, resumo de la baza intrigo: Mizantropa dresisto testamentas 230 milionojn da dolaroj al sia naskurbo kun la kondiĉo, ke la Urba Konsilantaro starigu en la zoologia ĝardeno de la urbo monumenton, kiu figuru la renkonton de la Homo al Simio, reciproke manpremantaj, kaj la membroj de la Urba Konsilantaro, vestitaj en salonkostumo ĉiujare faru promenadon inter la bestokaĝoj kaj solene metu pajlokronon al la piedestalo de la monumento. Se la urbo rifuzus plenumi tiujn kondiĉojn kaj rezignus pri la heredaĵo, oni devos disdoni ĝin egalproporcie inter la prostituitinoj de Strutmagen. En la ĉisuba fragmento la urba notario Krak vizitas la urbestron Kazimiro Jenlafiŝ por informi lin pri la testamento kaj ĝiaj kondiĉoj.

HURA! HURA! HURA! HURA! HURA!

...Aŭtomobilo haltis antaŭ la pordego de la urbestro. Jonathan Krak, la notario, kun ŝvitanta frunto, saltante du ŝtupojn suprenkuris kaj subite bremsis antaŭ la pordego. Lia plenda rigardo helpopete fiksiĝis al la skribisto, kuranta post li. Stubek, laŭaspekte kiel la sep malgrasaj jaroj mem, kunsentis kun sia ĉefo, ĝemspiris, perokule petegis al la ĉielo, poste senkonsile, sed servoprete ankaŭ li haltis ĉe la fermita pordego.

— Stubek, bonvolu ekpremi la butonon!

La brako de la skribisto obeeme eksvingiĝis. Akra sonorilbruo rompis la silenton de la domo. Al Jonathan Krak ŝajnis, ke tiu ĉi sonorilo orelfende bruas hodiaŭ. Kiel danĝersignala veo, kiu renversas la ĉiutagecon.

La pordisto malfermis la pordegon kaj profunde riverencis. Sinjoro Krak turnis sin al li.

— La sinjoro urbestro, ĉu...?

— En sia skriboĉambro.

— Bone, — li diris kaj ekiris. Stubek, spasme tenante la paperujon sub sia akselo, rapidigis siajn paŝojn post la liaj. En la vestiblo akceptis ilin la ĉambristino.

— La sinjoro urbestro, ĉu...?

— En sia skriboĉambro.

— Ĉu li laboras?

— Eble, — respondis ruze ridetante la ĉarma blondulino. En tiu horo tedas lin ĉia vizito.

— Sed mi nepre devas paroli kun li. Bonvolu raporti al li, ke Jonathan Krak, la urba notario, deziras fari viziton ĉe li.

La ĉambristino malaperis malantaŭ la remburita pordo de la skribeĉambro tirante post si la sopiran rigardon de sinjoro Stubek. Ĉiu blondulino kaj ĉambristino estis la sopirpunkto ĉe la skribisto. Li vidis en la blondeco anĝelan naivecon kaj en la ĉambristino enkarniĝon de sindono. Sinjoro Stubek estis ja juna kaj flirtema (nu, tiomgrade, kiom povas esti flirtema iu aktovermo) kaj pro tio estas pardonebele, ke dum longa minuto li forgesis pri sia subuleco kaj revadis.

— Stubek, — vekis lin la seka voĉo de la ĉefo — vi restos ekstere. Se mi bezonos vin, mi vokos vin.

— Jes.

— Donu la paperujon!

— Laŭordone, sinjoro notario. — Li transdonis ĝin kaj en liaj okuloj rebrilis la petola penso, kiun en li vekis la dike remburita pordo de la skribeĉambro.

En la urbestra ĉambro la ĉambristino piedpinte faris kelkajn paŝojn al la sinjoro, kiu dormis korpulentigan sonĝon post la abunda tagmanĝo. Kazimiro Jenlafiŝ celscie faris tion dum ĉiu posttagmezo en la mola sino de sia leda fotelo. Li bone sciis, ke la ventro, elstaranta kun deca digno, havas gravan rolon en la altigo kaj konservo de la aŭtoritato. Lian vizaĝon kovris la plej freŝa numero de la „Ĉioscio". Li legis ja nur registaran ĵurnalon. El la ĵurnaloj de la opozicia partio nur tiuj artikoloj interesis lin,

kiujn krajonsignitajn transdonis lia sekretario al li. Legi opozician ĵurnalon flanke de la urbestro estas teda laboro kaj flanke de la civitano estas peko. Ĉi tiun internan principon — kompreneble — li ne publikis. La ĵurnalo kaŝis do lian vizaĝon, sed ĉirkaŭ lia kalva kapo aŭreolon briltek-sis la aŭtuna suno. Liaj grandaj grasaj manoj pendis ĝis la planko. En tiuj manoj, tenantaj la bridrimenon de la urbo, klare montriĝis tiu veturigista energio, per kiu li obeigis la partiojn, okulumantajn al diversaj mondperceptoj.

La ĉambristino singarde forigis la sursternitan numeron de la „Ĉioscio" kaj post la malkovra gesto la kaŝitaj ĉarmoj de la sinjoro urbestro fariĝis videblaj. Sane plenvanga, trimentona vizaĝo, iom suspekte ruĝeta terpomforma nazo kaj nikotinflavaj lipharoj kun enviinda longeco faris lin karakterize interesa je lia plej granda ĉagreno, ĉar tiuj malbenitaj karikaturistoj volonte trouzis tiujn malavarajn donacojn de la naturo.

Je la delikata tuŝo de la ĉambristino ekmoviĝis la kolosa korpo.

— Nu, kio?... Kio okazis denove? — La lamenta voĉo kiel vivanta refuto mokis lian imponan eksteraĵon. Ĝi knaris kiel trouzitajn fajfilojn havanta gurdo kaj se li incitiĝis, tiam en neatingeblaj sferoj ĝi singultadis. — Ĉu mia fratino vekigis min? Diru al ŝi, ke ni havas ankoraŭ tempon.

— Sinjoro Krak, la urba notario estas ĉi tie. Nepre li volas paroli kun la sinjora moŝto.

— Diru al li, ke mi tre bedaŭras, sed mi ne povas akcepti lin. Hodiaŭ estos enketo, pli ĝuste bankedo ĉe lia ekscelenca moŝto la financministro kaj mi nun preparas min... Ĉu komprenite?

— Jes, sinjora moŝto, sed...

— Kia sed? Ne ekzistas sed! Pro la amasiĝinta laboro mi ne scias ja kie estas mia kapo, nu!

— Bone, mi diros, sed laŭ mia opinio li volas paroli pri tre grava afero, ĉar li ŝajnas esti tre incitata kaj kunportis sian skribiston.



— Jes, tiel? Verŝajne denove tiuj ĉi malbenitaj liberalistoj volas mueli pipron sub mia nazo... Nu, mi finos kun ili!... Enlasu tiun Krak!... Atendu nur momenton, Lida! Kia homo li aspektas? Ĉu liberala?

— Mi ne scias, sinjora moŝto.

— Nu, kompreneble, kiel vi scius... Sed kial vi ridetas?

— Pro nenio... sed mi pensas, ke li apartenas al la partio de via sinjora moŝto.

— Jes? Pri kio vi pensas?

— Nu, ili ambaŭ ŝajnas timemuloj.

— Sed diri tion?!... Tuj enkonduku sinjoron Krak!

La ĉambristino eliris. La urbestro eksidis al sia skribotablo kaj ŝajnigis fervoran studadon pri la memorando de la kloakopurigistoj. Estis ja tempo, ĉar la notario kun humila klino jam paŝis en la ĉambron. Sinjoro Jenlafiŝ tuj rekonis en li la senvertebrecon de la urbaj oficistoj, kaj kun facila rideto proponis sidlokon al sia gasto.

La notario eksidis. La ĝena devoplenumo ŝvitperlis sur lia frunto. Li forviŝis ĝin kaj kun parolatenda respekto fiksis sian rigardon al la vizaĝo de lia urbestra moŝto. Jenlafiŝ ekkompatis lin, rememoris pri la rimarko de la ĉambristino. Fakte, tiu ĉi estas lia partiano. Nur liaj partianoj aspektas tiaj timemuloj. Amikece li metis la manon al la ŝultro de la notario.

— Nu, kio nova, sinjoro Krak?

— Sinjora moŝto, tiu Vilhelmo Grauer, la artisto, mortis.

— Dio donu ripozon kaj pacon al li! Sed tio ĉi tute ne interesas min.

— Al mi estus permesite deklari libere mian opinion, ĉar mi kontraŭdiras al via urbestra moŝto, kaj tiun Vilhelmon Grauer mi deziras en la profundan fundon de la fajra infero. Sinjora moŝto, tiu ĉi freneza dresisto, tiu ĉi ekstravaganculo, mankumanta ĉian homan dignon, tiu ĉi naskito de nia amata urbo Strutmagen...

— ...mortis. Tion mi scias — senpaciencis la urbestro. — Ĉu ni devos enterigi lin?

— Ho, tute ne! Hieraŭ oni enterigis lin kun tia pompo, je kia havas rajton nur kronprinco. Ne tio estas la domaĝo! Sed Vilhelmo Grauer estis amerika civitano, kiu testamentis sian tutan havaĵon 230, tio estas, ducent tridek milionojn da dolaroj al nia urbo.

— Kioooo? Dudududucenttri... — la surprizita urbestro senvoĉe malfermadis la buŝon kaj impresis kiel grasa siluro sur la bordo. Li energie ekkaptis la dorsapogilon de la seĝo, kvazaŭ li kaptus jam la tutan heredaĵon.

— Jes, du-cent-tridek milionojn da dolaroj.

— Sed homo, la ŝtata kapitalo de la tuta Bagonio ne superas tiun sumon!

— Kion fari? Fakto estas fakto. La reprezentantoj de la Urba Konsilantaro laŭ la deziro de la testamentinto ĉeestis dum la lego de la testamento.

Kazimiro Jenlafiŝ komencis ekscitite kuradi tien kaj reen. Dum momentoj desegniĝis antaŭ liaj okuloj la ĉefurbo, metropoliĝinta sub lia urbestreco, kaj li vidis eĉ la statuon, por lia memoro starigitan de la dankema posteularo. Subita kolero ekregis lin.

— Kaj vi kuraĝis deziri en la profundan fundon de la fajra infero tiun ĉi puran bagonan karakteron, tiun ĉi grandaniman patrioton, danke rememorantan pri sia patrujo? Sinjoro Krak, espereble vi ne apartenas al la liberala partio, aŭ jes?!

— Dio gardu min! — protestis la timigita notario — sed sinjora moŝto, ankoraŭ vi ne bonvolis finaŭskulti la motivigon de mia antaŭe citita deziro. Tiu ĉi freneza miliardulo ligis la posedeblecon de la heredaĵo al tiaj kondiĉoj, kiaj estas senekzemplaj ne sole en Bagonio, sed ankaŭ en la historio de la tuta kulturmondo. Tiuj kondiĉoj vangofrapadas la Homaron kaj estas neplenumeblaj.

— Mi ne komprenas. Bonvolu pli detale klarigi!

— Plej oportune, se mi legos por vi la koncernan dokumenton. — Sinjoro Krak prenis la skribon el sia paperujo. Ĝi estis nur kopio, ĉar la originalon transprenis oficiale la urba arĥivisto. — Jen, bonvolu bone atenti!

Donante certan aplombon al gravaj vortoj kaj kritikaj partoj la notario laŭtlegis la testamenton de Vilhelmo Grauer. La urbestro variigis sian koloron. Li fartis kiel tiu, sub kiu oni fortiradas la tapiŝon. Ne sole la forruliĝantaj dolaroj zigzagis antaŭ li, sed li aŭdis eĉ la piedknaradon de la urbestra seĝo. Li paliĝis. Ne, tiu ĉi dokumento ne estas publikebla kaj provizore estas necese prisilenti ĝin. En tiu momento responde eksonis hurlo raŭka de kolportisto: „Heroldo de l' Popolo... Eksterordinara eldono!... Testamento de Vilhelmo Grauer... Ducent tridek milionoj da dolaroj al la urbo Strutmagen..." Ĉirkaŭ la kapo de Kazimiro Jenlafiŝ vagadis tiu certa afero, kiun al li ofte deziris liaj malamikoj.

La notario finis la legadon.

— Sinjora moŝto, kiel vi povas konstati, la afero estas serioze konsiderinda. la du subskribintoj, kiel atestantoj, estas amerikaj civitanoj, kiujn ni ne povas akuzi sen diplomatia konflikto, kaj la heredaĵon, gardatan en la plej bonfama banko de New York, ni ne povas konfiski.

— Ho, ke la fulmo estus trafinta la tutan aferaĉon!

— Identan opinion mi havas la honoron esprimi koncerne la aferon.

— Sed nepre ni devas trovi ian elirvojon — incitite ekkriis la urbestro. — Tiom da mono oni ne elĵetas tra la fenestro! Hodiaŭ vespere bankedon aranĝos lia ekscelenca moŝto la financministro. Pro tiu ĉi neatendita intervenaĵo, tre verŝajne, la bankedo fariĝos enketo. Mi fidas plene la genion de lia ekscelenca moŝto Tobio Akapar.

— Ne estas permesate forgesi, sinjora moŝto, ankaŭ tiujn sekurigajn aranĝojn, kiujn entenas la testamenta klaŭzo. Bonvolu rememori pri la

antaŭe legitaj! La kontrolo pri la plenumado de la testamentaj kondiĉoj estas komisiita al la prokuroro de tiu banko, en kies sefo n-ro 135, ŝlosita kaj sigelita de Vilhelmo Grauer mem, estas gardata la grandioza heredaĵo. La sefo estas asekurita ĝis plena valoro de la sumo testamentita kontraŭ ŝtel- kaj sigelrompo kaj brulo, kaj tiel la vivekzisto de la asekura socieo dependas de tio, ke la sefo ne estu malfermita antaŭ la limtago. Tiu ĉi limtago koincidas kun la limtago de la plenumotaj kondiĉoj. Ni vicigu la konsekvencojn! Unue, la inventariado de la heredaĵo estas malhelpita; due, se dum la limigita tempo ne estos plenumitaj la kondiĉoj, la tuta grandioza kapitalo transiros en la ŝtatan kason de Usono. Kaj ni ne forgesu pri la filo de la testamentinto, pri Cezaro Grauer.

— Kiooo? Eĉ filon li havas? La testamento tute ne mencias lin.

— Jen, ĝuste tio mirigas min pleje. Sed tiu ĉi forgeso, fakte senheredigo komplikas la situacion. Laŭ la heredleĝo la senheredigita infano havas rajton procesi kontraŭ la testamenton, escepte, se la infano jam estis kontentigita, rekompencita dum vivo de la gepatroj. Nun la demando, ĉu Vilhelmo Grauer rekompencis jam la filon dum sia vivo?

— Kolose! Piramidale! — Kazimiro Jenlafiŝ entuziasmis pri la subita ideo kaj tiel forte ekskuis la notarion, kvazaŭ li estus volinta forigi la animon el li. — Homo, aŭskultu! La prostituinoj estas solvitaj!

— Kikikieeel? Mi ne komprenas... Solvitaj??!

— Aŭskultu, homo! La filo procesos kontraŭ la testamento, por ke li povu ricevi sian parton, laŭleĝe certigitan. Sed la urbo grandanime rezignos pri la tuta heredaĵo kaj sekrete interkonsentos kun la juna Grauer, kiu kiel rajta posedanto redonos la duonon de la heredaĵo per donacdokumento al la urbo. Estos nek proceso, nek perturbo. Nu, kiel vi opinias? Kolose, ĉu ne?

— Bedaŭrinde, mi devas deklari kontraŭopinion al tiu de via sinjora moŝto, sed tion mi faras kun respektoplena bedaŭro. jen, miaj argumentoj: unue, ĉar la juna Grauer ŝvebas inter vivo kaj morto en nia plej bonfama sanatorio; due, ĉar li volas aŭdi nenion pri la heredaĵa afero, malbenas la memoron de sia patro, aŭ alivorte li rezignis pri sia heredrajto; trie, ĉar se la urbo mem eĉ rezignos pri sia rajto, kiun certe ne volonte faros, tamen restos la rajto de la prostituinoj, loĝantaj en la urbo Strutmagen kaj ili procesos; kvare, ĉar...

— Sed tio ja neebla! Ĉiu aparte ne povos fari tion?

— Ili organizos sin en societo, havanta statuton, kaj ilia prokuroro...

— Harstariga teruro! La prostituinoj, kiel morala korporacio! Frenezaĵo!

— Do, kvare, ĉar eĉ la persvado ne havas racion ĉe la juna Grauer, la vicordo de la heredo restos ja: la urbo, la prostituinoj aŭ Usono mem en kazo de plena rezigno. Ĉu vi bonvolas kompreni la situacion?

– Harstariga teruro! La prostituinoj kiel morala korporacio...





Antaŭ cent jaroj, la 14an de aprilo 1866 naskiĝis en Arad (nun en Rumanio) Árpád Tóth, la mildavoĉa poeto, virtuozo de poeziaj formoj, unu el la plej eminentaj bardoj de la hungara poezio de nia jarcento. Mezlernejon li finis en Debrecen, poste li fariĝis studento de la filologia fakultato de universitato en Budapeŝto. Li estis softvoĉa, sin retiranta junulo, kion klarigas ankaŭ lia grava malsano: la tuberkolozo. Li ofte restadis en kuraclokoj, precipe en la montaro Tatroj.

Pro financaj kaŭzoj li ĉesigis la universitatan studadon kaj rehejmeniĝis al Debrecen, al loko de la iama, infanaĝa feliĉa vivo — kiun li jam tamen ne plu sukcesis retrovi.

En tiuj jaroj ekregis lin profunda senespero, rezignacio; lia poemo, verkita en 1908 bone karakterizas tiun animstaton:

En senfrukta horo

Mi estas sola
Tute.
Larmoj elfluas
Mute.
Sur tablo mia vaksa tolo,
Mi skulptas kanton en la solo.
Povra, magra, mi, figuro,
Ulo,
Estanta sola en naturo.

Trad.: M. *Fejes*

Li eklaboris ĉe la urba gazeto en Debrecen, sed tiu ĉesis en 1913. Li faris provojn en Budapeŝto ĉe pli gravaj ĵurnaloj, intertempe li vivtenis sin kiel ĉehejma instruisto.

Liaj verkoj regule aperis en la gvida literatura revuo „Nyugat" (Okcidento), ĉirkaŭ kiu kolektiĝis tiutempe la elito de la hungara beletro.

Li edziĝis en la jaro 1917, kaj sekve de tio venis en lian vivon feliĉa etapo. Anna, lia edzino estis vera, bonintenca helpanto kaj flegistino.

En la sama jaro aperis lia unua poemaro: „Sur malvigla galero", kaj en 1922 la dua, kies titolo estas „La ĝojo forflugas".

Árpád Tóth

VESPERA LUMO-ARKO

Veluroj grizaj flokis jam la vojon,
Kaj korpaj ombroj falis tra la parko,
Vian hararon milde lastan fojon
Traplektis la krepuska lumo-arko:
Brilo penetra, pala kaj edifa,
Kiu ne plu jam estis lumo tera,
Sed nur aromo kaj silento driva
En transmigrado de anim' vespera.

Aromo, paco. La arom' mistera
Brilis harare en ĉiela paco,
Kaj bone estis vivi sensufera:
La lumoj oris ĝis la kora laco;
Ne sciis mi: ĉu vi mem estas tio,
Aŭ arbetaĵo flama en vi korpas,
En kies mezo jam aperis Dio,
Kaj la spirito sankta min absorbas?

Silente, longe staris mi ravita,
Minutoj velkis kaj miljaroj ĝermis,
Tiam min tuŝis via man' invita,
Kaj la palpebrojn lante mi malfermis.
Mi sentis: en la koron per lavango
De melodioj venas, kaj proklamas
En svenaj vejnoj per bolanta sango
La tera sento: ke vin mi tre amas!

El la hungara: Imre *Szabó*

Li ne estis ribelema, tamen, dum la mondmilito ankaŭ li verkis poemojn kontraŭmilitajn. En la periodo de la kontraŭrevolucio (post 1919) naskiĝis liaj tradukaj verkoj el Baudelaire, Verlaine kaj Wilde, kiuj fariĝis perloj de la hungaren tradukita poezio.

Bedaŭrinde, la grava malsano iom post iom fariĝis pli danĝera, kaj malgraŭ la konstanta, zorgema flegado li mortis en 1928.

Li malmulte vivis kaj malmulte verkis (se ni ne kalkulas la ĉiutagan ĵurnalistan laboron); ne pli ol ducent poemoj restis post li, kaj dekduo da noveloj. Tamen, tiuj havigas al li lokon en la unua vico de la niajarcentaj hungaraj poetoj.

Liaj poemoj esperantlingve aperis en ambaŭ eldonoj de *Hungara Antologio*, kaj de tempo al tempo en nia revuo.

Tibor *Bessenyei*

Árpád Tóth

VESPERA RADIO-KRONO

Jam silka grizo sur la voj' efektis
Kaj korpaj ombroj falis tra la bosko,
Radiokronon fajnan al vi plektis
En frondhararon vian la krepusko:
Similan al nenia tera lumo,
Radiis pala brila seriozo,
Arom', silento en vespera kuno,
Filtritaj kunen far metempsikozo.

Arom', silento. Ankaŭ pac' ĉiela
Harare brilis, kaj sekret-odoro,
Kaj bonis vivi, milda lumo hela
Okulsorbita trafis min ĉe koro.
Ne sciis mi, ĉu fakte do vi memas,
Aŭ rozarbust' sovaĝa vi ja estas,
Ĉu el la frond' animo dia tremas,
Kaj ene nun li alteriĝa nestas?

Ravita staris longe mi silente.
Minutoj pasis kaj jarmiloj venis,
Palpebrojn miajn levis mi atente,
Kiam la manon al mi vi ekprenis.
Kaj mi eksentis: jen torento kora,
Muziko ritma el profund' elanas,
Kiel la sang' en miaj vejn' torpora
Ĉi tera sent': kiome vin mi amas!

El la hungara: Márton *Fejes*

Árpád Tóth

BULVARDA AŬRORO

Aŭrore regis blinda, griza tono,
Vitraokule dormis la vendejoj,
Balais polvon de ŝtonregiono
Dormemaj, pigraj majstroj de la domo,
Kiel koboldoj tristaj, lantaj feoj.

Ekardis intermure lum' subite,
El firmament' eosta radiado,
De cent sunetoj brilis suntrafite
Vitroj, sur vojo disruliĝis glite
Senfina Lum', karato-miriado.

Ravita staris strat'. Ĉe trotuaro
Akaciarbo sorbis lumon karan,
Hezite en la verda frondhararo
Ekvibris riĉo de printempo: paro
Da grapoloj, havantaj floron palan.

Al lumo sonoj ne respondis rime,
Muzikis nur koloroj kantobirde,
Ekkantis lilan kanton envitrine
Kravato, poste ie malproksime
Sonorilegoj sonis ek malmilde.

Fabriksireno muĝis, tram' impetis
Sur la trivitaj reloj de pavimo,
Aŭror' al sobra labortago cedis,
Neniu vidis jam, ke Suno ĵetis
Mankison oran al proletknabino.

El la hungara: Márton Fejes

Kvardek jaroj de la Belarta Skolo en Baja

István Fejes: „Aktor-reĝo"

(Foto de Jakab Regős)

Gyula Rudnay: „Pejzaĝo kun rajdantoj" (1925). Oleo sur tolo. 40 x 60 cm. (Foto de László Bérci)

La pitoreska apud-Danuba urbo Baja samtempe kun la jarcentŝanĝo ŝanĝis ankaŭ sian karakteron. Longtempe determinis ĝin la agrikulturo, sed ĉiam pli gravan rolon ekhavis la industrio kaj la edukado, t.e. ekfunkciado de mez- kaj faklernejoj, gimnazio kaj liceo. Tiu medio poste plu altiris homojn de intelekto kaj de artoj; eminentaj pedagogoj kaj belartistoj ekloĝis ĉi tie, kaj entreprenis la noblan taskon: popularigi, kulturi kaj disvastigi la sciencojn kaj artojn.

Precipe pentristoj radikiĝis en la urbo. Inter tiuj la plej konataj estis: János *Tornyai* (1869-1936), István *Nagy* (1873-1937), Sándor *Éber* (1878-1947); ĉi tie naskiĝis kaj laboris ankaŭ Ede *Telcs* (1872-1948), skulptisto kaj medalisto.

La fondinto de la Skolo

Ne estas do hazarde, ke ankaŭ la fama pentristo, akademia profesoro Gyula *Rudnay* post sia pensiiĝo tiun urbon elektis por plua agado.

Majstro Rudnay naskiĝis en 1878 kaj en 1892 li ekstudis en la Artindustria Lernejo de Budapeŝto. Sekvis studoj en Munkeno (ĉe la hungara pentristo Simon *Hollósy*), poste en Romo, en la pentrista kolonio de Nagybánya (nun: Baia Mare en Rumanio), poste Parizo... kaj plurjara diligenta laboro en diversaj urboj de la Granda Hungara Ebenaĵo, kie li serĉis esprimformojn de la hungara animo. Li ekspoziciis en Venecio, Romo, Vieno, Milano, Amsterdamo, Hago ktp. — kaj venis ormedaloj. La hungara ŝtato inter la unuaj honoris lin per la premio „Kossuth".

Kune kun la disĉiploj

La emerita profesoro laŭ propono de sia asistento Ferenc *B. Mikli* decidis translokiĝi al Baja, kaj tie fondi pentristan kolonion kaj skolon por junaj, popolaj talentoj.

La urbaj aŭtoritatoj subtenis la aferon kaj donis konvenan ejon (iaman nobelan kastelon) por la funkciado. Krom *B. Mikli* venis ankaŭ pentristoj István *Kun*, János *P. Bak*, Ödön *Iványi* — kaj ili kune komencis la instruadon: kaj venis gejunuloj are, soifantaj belon...

Unu jaron la Skolo funkciis kiel „Akademio", poste sub la nomo „Belarta Libera Skolo" — ĝis 1953. En tiu ĉi jaro la Majstro relokiĝis al Budapeŝto, kaj la Skolo formiĝis je „Belarta Rondo Gyula Rudnay", kiu eĉ nun funkcias, ekde la jaro 1964 sub la egido de la Kultura centro „József Attila".



István Fejes: „Pro Patria? " (Foto de Bence Tihanyi)



Gyula Rudnay: „Rekruto" (1916). Oleo-pentraĵo sur tolo, 81,5 x 68 cm. (Foto de László Bérci)

La fondintoj de la Skolo ne volis konkurenci kun la ŝtataj belartaj lernejoj kaj altlernejo, ili ne celis, ke la disĉiploj fariĝu profesiaj artistoj; ili volis nur serĉi talentulojn kaj doni al tiuj estetikan edukadon. — Malgraŭ tio dum kvardek jaroj de la Skolo dekoj el la iamaj gelernantoj fariĝis eminentaj kreantoj: pentristoj, grafikistoj, gobelinistoj, filmartistoj ktp.

Mem la Majstro mortis en januaro de 1956. Sed tridek jarojn post lia morto, okaze de la kvardekjara jubileo de la fondo de la Skolo komenciĝis serio de ekspozicioj. La unua estis inaŭgurita la 17an de januaro, kaj ĝi prezentis la bildojn de Rudnay. Poste sekvis ekspozicioj de la disĉiploj, ĉiumonate po unu.

En februaro estis ekspoziciitaj bildoj de kvar asistentoj de la majstro, tiuj de pentristoj István *Kun*, János *P. Bak*, Ferenc *B. Mikli* kaj Ödön *Iványi*.

La ekspozicio inaŭgurita en marto omaĝis al la memoro de pentristo István *Fejes*, kiu mortis juna antaŭ kvar jaroj, kaj kiu per siaj grafikaĵoj kelkfoje kontribuis ankaŭ al nia revuo.

La pentraĵojn de *Rudnay* gardas la Hungara Nacia Galerio kaj diversaj eksterlandaj muzeoj. Sed lia spirito vivas plu ankaŭ en la krea arta laboro de liaj disĉiploj.

M. F.

La iamaj disĉiploj ĉe inaŭguro de ekspozicio de Rudnay (Foto de László Bérci)

Junpioniroj jubileas

La 2an de junio 1946, en la tago de la junularo, sur la ĉefa placo de Budapeŝto kolektiĝis pluraj miloj da infanoj kaj gejunuloj kun la celo postuli rajtojn por la junularo. Ĉirkaŭ la kolo de la infanoj pompis triangula kolora kravato. En tiu ĉi tago estis proklamite, ke en Hungario fondiĝis la unua demokratia infana organizaĵo, la *Asocio de Hungaraj Junpioniroj*.

Depost tiam pasis kvardek jaroj. Dum tiuj ĉi kvar jardekoj nature multe ŝanĝiĝis la infana organizaĵo, kiel ankaŭ la hungara socio. Sed ĝia celo restis la sama: unuigi la hungarajn infanojn, per ludaj-romantikaj rimedoj fortigi ĉe ili la senton de kunaparteno, kaj profundigi la amon al la socialisma patrolando.

Kiuj estas la aluditaj ludaj-romantikaj rimedoj?

La 31an de julio 1948 oni transdonis al la hungaraj junpioniroj la *junpioniran fervojon* (vd. sur la frontpaĝo!), kiu havas 11 kilometran linion. En tiu ĉi fervojo servas junpioniroj: ili plenumas la laboron de trafikdirektado, vendado kaj kontrolado de biletoj ktp. En la sama tago en Csillebérc estis inaŭgurita la Junpionira Respubliko, kiu ĝis nun estas konstanta scenejo de internaciaj renkontiĝoj de infanoj. Dum la jaro 1975, sur la bordo de Balatono, en Zánka ekfunkciis junpionira urbo, kie okazas seninterrompe movada instruado por pluraj miloj da junpioniroj. La infanaj sportistoj povas pruvi sian lerton en la ĉiujaraj *Junpioniraj Olimpikaj Ludoj*, kiuj okazas en la Junpionira Stadiono sur la Margarita Insulo en Budapesto.

La Nacia Prezidio de Junpioniroj ĉiujare iniciatas centrajn kampanjojn, kiujligiĝasordinare al historiaj jubileoj, foje al ekonomiaj eventoj. Tiuj iniciatoj donas nur la kadrojn de la agado; la konkretajn formojn kaj manierojn de la realigo difinas memstare la junpioniraj taĉmentoj. Jen kelkaj tiaj kampanjoj el la pasintaj kvardek jaroj:

1951: Kolektado de utilaj materialoj.

1955: La flagoj de danko: ĉiu taĉmento festis la 10an datrevenon de la liberiĝo de Hungario kudrante-brodante flagon kiu surhavis la simbolon e la koncerna taĉmento.

1959: Laŭ la spuroj de la revolucio: la junpioniroj kolektis materialojn kaj informojn pri la Konsilia Respubliko de la jaro 1919.

1963: Junpionira ekspedicio en la futuron — tiu ĉi fantazivigliga ludo volis malkovri, kian imagbildon havas la junpioniroj pri Hungario en la jaro 2000?

1981: Kun agoj por la prestiĝo de nia kravato!

Oni povus daŭrigi la denombradon de la kampanjoj, kiuj riĉigis la junpionirojn per novaj konoj. Tamen, dum la lastaj jaroj malpliiĝis la nombro de la centraj kampanjoj: ilin anstataŭigas agadoj kaj programoj iniciatitaj de la opaj taĉmentoj.

La plej malgranda unuo de la junpionira movado estas la *grupeto* (konsistanta el 8-10 infanoj), 2-3 grupetoj formas la *svarmon*, kaj la svarmoj (ordinare enkadre la unu lernejo) konsistigas la *taĉmenton*. La grupetojn gvidas grupetestro (infano), la svarmojn svarm-sekretario (infano) kaj svarmestro (plenkreskulo), la taĉmenton taĉmentsekretario (infano, elektita de la infanoj mem) kaj taĉmentestro (plenkreskulo, elektita de la svarmestroj). Lastatempe ĉiam pli klare montriĝas la bezono por ŝanĝoj. La lernejaj kadroj pruviĝis ĉiam pli malvastaj, kaj unu post la alia fondiĝas taĉmentoj ekster lernejoj (en junpioniraj kulturdomoj, sportkluboj ktp.). La infanoj ne ĉiam kontentas havi kiel svarmestron unu el siaj instruistoj. Tial ofte okazas, ke la laboron de svarmestro plenumas iu el la gepatroj aŭ plenkreskaj gefratoj.

Aŭtune de 1986 kunsidos la 9a Konferenco de Junpioniraj Gvidantoj. En tiu ĉi Konferenco oni pritraktos la iniciatojn de la infanoj, kaj la formojn de la enkondukotaj ŝanĝoj.

La plenkreskuloj celas ankaŭ en la estonto atingi unuavice tion, ke la infanoj inter pacaj, harmoniaj cirkonstancoj, en bona komununa atmosfero prepariĝu por sia plenkreskula vivo. Tiel, kiel formulis tion János *Kádár* en sia mesaĝo al la hungaraj infanoj: *„Ankaŭ vi povas fari multe por la paca estonteco. Iru ĉie kun malfermitaj okuloj, kun la firma volo zorgi pri aliaj homoj, kaj ankaŭ agi por ili. Lernu diligente, vivu honeste kaj gaje, tiel vi preparu vin por la plenkreskula vivo."*

Maria *Benczik*

Szilárd Bálint

LA STRANGA VERDIKTO

Neatendite vizitis la loĝejon de Ede kaj Eva ŝia frato, veninta el sia vilaĝo. Post iom da ripozo li deziris promeni tra la urbo kun Eva, kiu volonte akompanis la fraton, ĉar ŝia edzo Ede ankoraŭ ne venis hejmen. Ĉe la bordo de Danubo okazis, ke iu fraŭlino alparolis la gefratojn kaj petis permeson fotografi ilin antaŭ la rivera panoramo. Ili ne rifuzis ŝian peton, poste daŭrigante la promenadon en la sunbrila urbo turnis sin al la stacidomo. Post la adiaŭo Eva hejmeniris, ankaŭ Ede baldaŭ alvenis vespermanĝi.

Iutage Ede forlasis post la laborhoroj sian oficejon, kaj surstrate aĉetis ilustritan revuon. Trarigardante ĝin li ekvidis kuriozan foton, kie klare videblis profilo de lia edzino ĉe la Danuba bordo; apud fiŝhokistoj multaj sunumis sur la ŝtuparoj, kaj Eva tie interkisadis kun viro nerekonebla. Nenia dubo, la kisanta virino estis Eva! Ede konsterniĝis, li devis apogi sian dorson al la muro. Nun kion fari? Ĉu hejmeniri? Eble li ĝissange batos ŝin! Ne kaj ne! Pro tia frivola ino stari antaŭ tribunalon kaj riski prizonon? Neniel!

Ĉe la stratangulo haltigis lin trinkemo, kaj li enpaŝis kafejon. Li mendis ankaŭ brandon kaj aŭskultis la najbare sidantajn por forigi la proprajn pensojn tro furiozajn. Oni devas ja iomete trankviliĝi... Li aŭdis paroli pri vespere okazonta futbalmatĉo, onidire sensacia renkonto de famaj kluboj. Bona ideo! — pensis Ede — en la futbalejo li ventumos sian kapon, la ludo certe altiros lian plenan atenton.

Hejme Eva komencis jam nervoziĝi pro la nekutima foresto de Ede. Matene ja nenion li menciis pri ia postlabora okupo. Kio okazis? Ŝi ekrigardis la televidilon, kvankam videblis futbalmatĉo, kiun ŝi ne ŝatis. Dum tiu enuiga programo abrupte montriĝis mem Ede, la tiom atendata edzo! Kaj kiel? Strange, li entuziasme krias kaj saltas, krias golon, same kiel la aliaj, sed Ede nun — brakumas la apude sidantan junulinon, eĉ, ili interkisadas...

Ĉagrenite Eva ĵetis teren la vazon desur la televidilo. Kion fari? Do evidentiĝis la daŭra mensogado de ŝia edzo! Eĉ kvereli ŝi ne havis emon kun tiu fiulo. Tiu aferaĉo ja ne estas diskutebla, interparoli ŝi eĉ ne riskas timante siajn nervojn — kuris la pensoj tien-reen en ŝia kapo. Mi forlasos lin! — ŝi ekdecidis — li vidos kion li perdis...

Apud la surtabligita vespermanĝo Eva metis mantreme skribitan mesaĝon: „Ede! Kanajla fripono! Post du jardekoj vi trompas min! Mensogulo, kiun mi naive prizorgas ĉiutage kiel stulte fidela edzino, dum vi kun junaj inoj amuzas vin! Mi vidis ĉion propraokule tra la televidilo! Restu do sola! Eva."

Post la ludo Ede eliĝis kun la homamaso el la futbalejo, kaj sidiĝis en aŭtobuson intencante hejmeniri. Kion ŝi diros, kiam li montros tiun damnitan foton? Ne, li ne batos ŝin, ni estas ja kulturitaj homoj, eblas ja eksedziĝi ankaŭ en paco...

Sed hejme neniu atendis lin. La trovita mesaĝo tute konfuzis lin. Tra la televido...? Kion li faris inter la ĉirkaŭsidantaj futbalŝatantoj? Neniom el siaj gestoj dumludaj li povis rememori — do malfacilas ion ajn nei el la akuzoj de Eva! Pli ol kurioze: li kulpigas la edzinon, kaj Eva akuzas lin pri malfideleco, eĉ de li nekonata! Malica afero!

Eĉ pluraj dormigiloj ne kontribuis al trankviliga dormo. Inkubaj sonĝoj vekis lin plurfoje por denove refali en premajn sonĝotombojn. Elĉerpite kaj lacege li foriris matene labori. Nu, li atendos, nenion farante pri la „afero". Estos la edzino, kiu prezentos sin ĉu baldaŭ, ĉu poste. La kolegoj rimarkis lian malbonfarton, sed Ede aludis la futbalmatĉon, kie li malvarmumis hieraŭ.

— Iru hejmen — ili rekomendis — via edzino flegos vin.

— Superflue... baldaŭ ĉesos mia febro — Ede respondis. — Cetere, mia edzino forvojaĝis al parencoj...

Vespere nenio ŝanĝiĝis. Eva ne montriĝis, Ede devis viziti restoracion por vespermanĝi. Poste nervoze li prenis la telefonon kaj vokis la bopatron.

— Ĉu Eva troviĝas ĉe vi? — demandis Ede.

— Jes... vi, fripono! Belega afero! — respondis la bopatro.

— Sed kial? Nenion mi faris! Eva lasis ian mesaĝon kun enigmo, kiun mi ne kapablas solvi.

— Mirinde... Ankaŭ mi vidis vin per televido dum la matĉo.

— Sed kiel? Mi vere ĉeestis, rigardis kaj ekscitiĝis, kiel la aliaj, eble tre gestante. Sed nenion pli... Voku Evan por iom paroli...

— Ne eblas! — kaj la bopatro demetis la aŭdilon.

Dum la sekvaj tagoj Ede jam preskaŭ forgesis pri la Danuba foto, ĉar ekscitis lin la enigma miskonduto de Eva. Vane li provis telefoni al sia edzino, fine li sendis leteron.

„Kara Eva! — li skribis — mi ne estas tia fripono, kia vi karakterizis min en via mesaĝo. Sed ĝuste mi estis insultita pro via, jes, via neakceptebla ago kontraŭ la fideleco! Ties pruvo estas aĉetebla tra la stratoj, en la Bildrevuo! Nu, se vi tiel avide



amas tiun viron, mi ne volas malhelpi vian estontan feliĉon kun li! Do mi proponas pacan disiĝon, kaj vi ambaŭ estu feliĉaj! Miaflanke mi pardonas kion vi faris kontraŭ min. Ede!"

La respondo de Eva rapide alvenis: „Vi estas vere abomeninda! Ĉu estas vi, kiu volas pardoni??? Vi, kiu adultis antaŭ la televida publiko? Venĝi mi tamen ne volas la ofendon, sed mi devas kompati vin pro via subnivela moralo!"

Leginte la leteron Ede ĵetis kolere teren la alian florvazon, kaj rapidis al advokato. Eĉ tiu ruza kato ne povis solvi la aferon interparolante kun la edzino. Ĉe la tribunalo la eksiĝemaj geedzoj kaj iliaj advokatoj deklaris siajn starpunktojn, sed la procesado alie finiĝis, ol ili deziris. La tribunalo malakceptis la argumentojn kaj disponis per interesa verdikto.

* * *

!

Kara Leganto! La Redakcio ne ricevis la verdikton, tial ni petas vian helpon: bonvolu verki la tekston de la verdikto, kaj informi, kion faris poste niaj herooj. La plej bona solvo (ĝis 30 tajpitaj linioj) ricevos libropremion kaj ĝi aperos en Hungara Vivo. Limdato: unu monato post la alveno de tiu ĉi historio.

DAŬRIGO
de la novelo
La neatendita evento
aperinta en la numero 1985/5
Daŭrigas:
V. V. Petelĉic, Nikolajev, SU

Jes, la jurstudento, post multaj meditadoj, por kiuj li tamen ne bezonis studi siajn librojn, trovis bonan solvon. Iutage li vizitis la loĝejon de Ida, kaj kun serioza mieno li ekparolis:

— Gratulu min, karulino! Mi iĝos patro!

— Tio estas vere gratulinda okazaĵo, do akceptu miajn gratulojn — respondis la fraŭlino, kvankam sen brila ĝojo. — Mi opiniis ĝis nun, ke vi volas iĝi mia fianĉo, kaj post la studjaroj ni geedziĝos... Almenaŭ tion vi ŝajnigis al mi, kaj jen...

— Ho, tamen ne ekploru, karega Ida! Certe vi sentu vin mia fianĉino! Sed ankaŭ via afero, la ŝajna nasko devas esti finita urĝe. Tial mi registros min morgaŭ kiel la patro de nia etulino! Restas tamen plenumi unu bagatelon... estu mia karega edzineto! Kaj ni prenos nian filineton el la hospitalo...

— Karega mia, vi, mia amato! Ni ambaŭ iros al la registrejo — venis la respondo de Ida, sed la sekvajn vortojn anstataŭis — kisoj.

ARTHUR C. CLARKE

SUPERECO

Farante la jenan konfeson — laŭ mia libera volo — antaŭ ĉio mi volas perfekte klarigi, ke mi ne intencas kapti simpation, nek esperas mildigon de la verdikto prononcota de la Tribunalo, kia ajn ĝi estos. Mi skribas por refuti kelkajn mensogajn riportaĵojn elsenditajn de la radio-dissendilo de la malliberejo kaj publikigitajn en la gazetoj, kiujn legi mi ricevis permeson. Ili donistute falsan bildon pri la vera kaŭzo de nia malvenko, kaj estinte ĉefkomandanto de la militfortoj de mia specio, tempe de la ĉeso de la malamikado, mi konsideras mia devo protesti kontraŭ la brulstampado de miaj subuloj.

Mi ankaŭ esperas ke ĉi tiu konfeso eble klarigos la kialojn de mia peto al la Tribunalo, farita jam dufoje, kaj eventuale igos ĝin koncedi al mi la favoron, kiun rifuzi mi konas neniun kaŭzon.

La fina kialo de nia malsukceso estis simpla: malgraŭ ĉiuj kontraŭaj eldiroj, tiu ne estis la manko de braveco ĉe niaj soldatoj, nek kiu ajn kulpo de la ŝiparo. Nin venkis sole la malsupera scienco de niaj malamikoj. Mi ripetas: la MALSUPERA scienco de niaj malamikoj.

Komence de la milito ni ne pridubis nian finan venkon. La kunigita ŝiparo de nia Alianco multe superis, je nombro kaj armilaro, tiun de la malamikoj, kaj ni superis ilin en preskaŭ ĉiuj branĉoj de la militosciencoj. Ni kredis firme, ke ni povos gardi tiun superecon. Kaj tiu kredo pruviĝis, bedaŭrinde, eĉ tro bone fundamentita.

Komence de la milito niaj ĉefaj armiloj estis la longdistanca memdirekta torpedo, la direktebla sferfulmo kaj la variaj modifaĵoj de la Klydon-radiado. Ĉiu unuo de la Ŝiparo havis ilin. Kvankam ankaŭ la malamikoj posedis similajn armilojn, tiuj estis pli et-kapacitaj. Krome, nin helpis multe pli granda Organizaĵo pri Militaj Esploroj, kaj sekvve de tiu komenca avantaĝo nia malvenko estis ege neverŝajna.

La milito progresis laŭplane ĝis la Batalo de la Kvin Sunoj. Ni venkis, memkompreneble, sed la kontraŭstaro estis pli forta, ol antaŭvidite. Oni konsciiĝis pri tio, ke la venko povas esti pli malfacila kaj pli posta, ol ni estis pensintaj. Oni do kunvokis la konferencon de la superaj komandantoj, por diskuti pri la sekvenda strategio.

La unuan fojon ĉeestis nian militkonferencon profesoro-generalo Norden, la nova estro de la Esplora Stabo, ĵus nomita por plenigi la mankon kaŭzitan per la morto de Malvar, nia plej granda sciencisto. Al la estreco de Malvar ni dankis, plie ol al iu ajn alia faktoro, la efikecon kaj forton de niaj armiloj.Perdi lin estis grava bato, sed neniu pridubis la geniecon de lia posteulo, kvankam multaj ĉe ni diskutis, ĉu vere estis saĝe nomi teoriulon por plenumi tiel gravegan taskon. Sed la voĉdonado silentigis nin.

Mi bone memoras, kiel impresis Norden dum la interkonsiliĝo. La milit-konsilantoj havis zorgojn, kaj ili petis helpon de la sciencistoj. Ili demandis, ĉu eblus pliperfektigi la havatajn armilojn, por kreskigi nian nunan avantaĝon?

Norden donis tute neatenditan respondon. Tiaspecajn demandojn oni ofte direktis al Malvar — kaj li ĉiam faris tion, kion oni postulis de li.

— Sinjoroj, — diris Norden — mi dubas pri tio. Niaj ekzistantaj armiloj praktike atingis sian perfektecon. Mi ne volas kritiki mian antaŭulon, aŭ la bonegan laboron faritan de la Esplora Stabo dum la lastaj kelkaj generacioj, sed ĉu vi rimarkis, ke neniu esenca modifo de la armilaro okazis dum pli ol cent jaroj? Laŭ mi tio rezultis el la tradicio fariĝinta konservativa. Dum tro longa tempo la Esplora Stabo okupiĝis pri la perfektigo de la malnovaj armiloj, anstataŭ inventi novajn. Bonŝance ankaŭ niaj kontraŭuloj ne estis pli sagacaj, sed ni ne rajtas supozi ke tio restos tiel por ĉiam.

La vortoj de Norden postlasis malkomfortan impreson, ĝuste laŭ lia intenco. Li tuj ekatakis.

— Novajn armilojn ni bezonas: armilojn tute malsamajn de la pli frue uzitaj. Tiaj armiloj estas fareblaj; kompreneble tio daŭros iom da tempo. Sed post kiam mi ricevis la postenon, mi anstataŭigis kelkajn el la pli aĝaj sciencistoj per junuloj, kaj direktis la esplorojn al pluraj ne-esploritaj terenoj, kiuj estas tre promesaj. Fakte mi kredas, ke ni baldaŭ vivos revolucian tempon en la militado.

Ni estis skeptikaj. La alparolo de Norden estis iom fanfaronema, tio vekis en ni suspekton. Tiam ni ankoraŭ ne sciis, ke li neniam promesis ion ajn, kion li ne estus jam realiginta en laboratorio. "En laboratorio" — tio estis la ŝlosila fraso.

Norden pruvis sian eldiron ene de unu monato, demonstrante la Neniigan Sferon. Ĝi komplete malkomponis ĉiun materion ene de plurcent metroj radiuse. La povo de la nova armilo entuziasmigis nin — kaj ni preteratentis ĝian basan malavantaĝon: ke ĝi estas sfero, kaj pro tio ĝi detruas, momente de sia ekesto, sian komplikan generatoron. Tio signifis, memkompreneble, ke ĝi ne estis uzebla sur militŝipoj, sed nur surdirektitaj raketoj. Oni ekigis grandan programon por transformi ĉiujn memdirektajn torpedojnje portiloj de la novaj armiloj. Provizore ni ĉesigis ĉiun ofensivon.

Nun ni scias jam, ke tio estis nia unua eraro. Mi eĉ nunpensas, ke tio estis natura reago, ĉar tiam ŝajnis al mi, ke ĉiuj niaj armiloj estas subite arĥaiĝintaj, kaj ni rigardis ilin kiel primitivajn postrestaĵojn. Kion oni ne

taksis ĝuste, tio estis la grandeco de la tasko komencita, kaj la tempodaŭro bezonata por ekuzi la revolucian superarmilon en batalo. Nenio simila okazis ĉe ni dum cent jaroj, kaj ni havis nenian praktikon uzeblan.

La transformo montriĝis multe pli malfacila afero, ol ni antaŭvidis. Oni devis projekti novan klason de torpedoj, ĉar la normala modelo estis tro eta. Tio signifis, ke nur la pli grandaj ŝipoj povis elpafi la armilon, sed ni akceptis tiun malavantaĝon. Post ses monatoj la pezaj unuoj de la Ŝiparo estis ekipitaj per la Sfero. Ekzercaj manovroj kaj eksperimentoj pruvis, ke ĝi funkcias kontentige, kaj ni estis pretaj elprovi ĝin en vera batalo. Oni celebris Nordenon kiel donacanton de la venko, kaj li kvazaŭ promesis eĉ pli miraklajn armilojn.

Tiam okazis du eventoj.

Unu el niaj militŝipoj komplete malaperis dum ekzerca flugo. La esploroj malkovris, ke en iuj kondiĉoj la long-distanca radiolokatoro de la ŝipo ekfunkciigas la Sferon tuj post ĝia ekpafo. Por forigi tiun difekton sufiĉis triviala modifo, sed tio signifis pluan prokraston de unu monato. Tio kaŭzis malsimpation inter la stabo de la Ŝiparo kaj la sciencistoj. Kiam ni estis denove pretaj, Norden anoncis, ke la agoradiuso de la Sfero estas dekoble pliigita, milobligante la verŝajnecon detrui iun ŝipon de la malamiko.

Do, la modifoj komenciĝis denove, sed ĉiuj konsentis, ke la prokrasto valoras. Intertempe tamen la malamikoj, aŭdacigitaj per la foresto de niaj operacioj, faris surprizan atakon. Niaj ŝipoj havis malmulte da torpedoj, ĉar la uzinoj plu ne liveris tiujn, kaj ili estis devigataj retroiri. Tiel ni perdis la sistemojn Kirane kaj Floranus, krome eĉ la planedan fortikaĵon Rhamsadron.

Tio estis malagrabla, sed ne serioza bato, ĉar la perditaj sistemoj estis ne-amikecaj kaj malfacile regeblaj. Ni ne dubis: baldaŭ ni reokupos ilin, tuj kiam ekfunkcios la nova armilo.

Tiu espero realiĝis nur parte. Kiam ni rekomencis la ofensivon, ni devis tion fari kun malpli da Neniigaj Sferoj ol planite. Tio estis la unua kialo de nia limigita sukceso. La alia kialo estis pli serioza.

Dum ni ekipis per la nevenkebla armilo tiom da ŝipoj kiom eble, la malamikoj febre konstruadis. Iliaj ŝipoj estis malmodaj, kun malnovaj armiloj, sed ili nun nombris pli ol la niaj. Kiam ni ekagis, ni trovis, ke la malamika ŝiparo estas duoble pli granda, ol ni konjektis. Tio konfuzis la aŭtomatajn armilojn; rezultis pli altaj perdoj ol antaŭvidite. La perdoj de la malamikoj estis eĉ pli grandaj, ĉar se iu sfero atingis la celon, la detruo estis certa. Tamen la balanco ne svingiĝis tiom je nia avantaĝo, kiom ni esperis.

Eĉ pli, dum la batalado de la ĉefaj ŝiparoj, la malamikoj aŭdace atakis la malforte garditajn sistemojn Eriston, Duranus, Karmanidora kaj Faramidon, reokupante ilin ĉiujn. Tiel ni troviĝis minacataj nur je 50 lumjaroj de niaj hejmaj planedoj.

Dum la sekva kunveno de la ĉefkomandantoj oni faris multajn akuzojn, plejmulte kontraŭ Norden. Ĉefadmiralo Taksaris speciale emfazis, ke dank' al nia tn. "nerezistebla" armilo nia situacio malboniĝis. Laŭ li ni estus devintaj daŭrigi la konstruadon de tradiciaj ŝipoj, tiel preventante la perdon de nia kvanta supereco.

Ankaŭ Norden koleris. Li nomis la stabon de la ŝiparo sendankemaj fuŝistoj. Tamen ni konstatis, ke la neatendita turno de la eventoj kaŭzis al li zorgojn — same kiel al ni ĉiuj. Li diris, ke ni eble rapide trovos eliron el la malfavora situacio.

Nun ni scias, ke la Esploristaro estis laboranta jam plurajn jarojn pri la Batal-analizilo. Sed tiutempe tio ŝajnis al ni revelacio, ravanta nin tro facile. La argumento de Norden ja estis alloge konvinka. Kiom gravas, ke la malamikoj havas duoble pli da ŝipoj ol ni, se la efikeco de la niaj du- aŭ eĉ triobliĝas? Dum jardekoj, la limiga faktoro en batalado estis ne maŝanika, sed biologia: fariĝis ĉiam pli malfacile por iu sola menso, kaj eĉ por grupo de homaj mensoj,sekvi la rapidegajn ŝanĝiĝojn dum la komplika batalado en tridimensia spaco. La matematikistoj de Norden analizis kelkajn klasikajn batalojn de la pasinteco, kaj elmontris, ke eĉ kiam ni venkis, ni funkciigis niajn unuojn je malpli ol duono de ilia teoria efikeco.

Tion ŝanĝus la batal-analizilo, anstataŭante la stabon per komputiloj. Teorie la ideo ne estis nova, sed ĝis nun ĝi estis nur utopia revo. Multaj el ni povis malfacile kredi, ke ĝi jam ne estas nura revo. Sed post la simulado de kelkaj tre kompleksaj bataloj ni konvinkiĝis pri tio.

Oni decidis enkonstrui la Analizilon en kvar niajn pezajn ŝipojn, tiamaniere la ĉefaj ŝiparoj havos po unu. Tiam komenciĝis la malfacilaĵoj - kvankam ni rekonis tion nur poste.

La Analizilo enhavis preskaŭ milionon da vaku-tuboj, kaj oni bezonis kvincent teknikistojn por funkciigi ĝin. Tute ne eblis instali ĉiujn en la batalŝipo, do ĉiun el la kvar unuoj devis akompani po unu transformita pasaĝerŝipo, portanta la ne deĵorantajn teknikistojn. La instalado mem estis longa kaj enuiga procezo, sed per giganta fortostreĉo ĝi estis plenumita dum ses monatoj.

Tiam, je nia malĝojo, ni konfrontiĝis kun alia krizo. Preskaŭ kvin mil kvalifikitaj viroj estis selektitaj por servi ĉe la Analizilo. Ili partoprenis intensan kurson en la Teknikaj Lernejoj. Fine de sep monatoj, dek procentoj el ili kolapsis nerve, kaj nur kvardek procentoj trapasis la ekzamenon.

Denove ĉiuj kulpigis unu la aliajn. Norden, kompreneble, diris, ke la Esplora Stabo ne povas esti respondeca;tial li malamikiĝis kun la Estraro pri Personaro kaj Instruado. Finfine oni decidis, ke la unusola ebleco estis uzi nur du analizilojn, ne kvar, kaj funkciigi la aliajn du, kiam sufiĉe da teknikistoj estos instruitaj. Ne estis permesate al ni perdi la tempon, ĉar la malamikoj senĉese atakis, en ĉiam pli altiĝanta spirito.

La unua ŝiparo havanta Analizilon ricevis ordonon reokupi la sistemon Eriston. Dumvoje, pro milita hazardo, iu vaganta mino koliziis kun la ŝipo portanta la teknikistojn. Batalŝipo estus transvivinta la eksplodon, sed la pasaĝerŝipo estis komplete detruita, kune kun ĝia ne-anstataŭebla ŝarĝo. Sekve la operacio devis esti nuligita.

La alia ekspedicio komenciĝis pli sukcese. La Analizilo sendube plenumis la promesojn de siaj kreintoj: la malamiko estis grave venkita en la unuaj bataloj. Ili retiriĝis, lasante al ni la sistemojn Safran, Leukon kaj Heksneraks. Sed ilia spiona servo rimarkis la ŝanĝiĝon de nia taktiko, la enigman ĉeeston de pasaĝerŝipo meze de nia batal-ŝiparo. Ili notis ankaŭ, ke simila ŝipo estis akompananta nian unuan ŝiparon, kiu retiriĝis post ĝia detruiĝo.

En la sekva batalo la malamikoj ekuzis sian laŭnombran superecon por koncentre ataki la Analizilo-ŝipon kaj ĝian senarmilan akompanŝipon. La atako estis farita sen konsidero pri la perdoj (ambaŭ ŝipoj estis, nature, forte protektataj) kaj ĝi sukcesis. Rezulte, nia ŝiparo praktike senkapiĝis, ĉar ne eblis efike transiri al la malnovaj metodoj. Ni retiriĝis sub senĉesa pafado, perdante ĉiujn gajnojn, plus la sistemojn Lormija, Imarnus, Beronis, Alfanidon kaj Sideneus.

Tiuetape ĉefadmiralo Taksaris esprimis sian malkonsenton kun Norden per sinmortigo, kaj la ĉefkomandanto fariĝis mi.

La situacio estis serioza kaj furioziga. Tradiciemaj kaj senfantaziaj, la malamikoj daŭre ofensivis kun siaj malnov-modaj kaj malefikaj, sed jam ege pli multenombraj ŝipoj. Vole-nevole ni konsciiĝis pri tio, ke se ni estus daŭrigintaj la ŝipkonstruadon sen serĉi novajn armilojn, nia pozicio nun estus multe pli bona. Je multaj akraj diskutoj Norden defendis la sciencistojn, dum ĉiuj aliaj kulpigis ĝuste ilin pro la okazintaĵoj. La malfacilaĵo estis, ke Norden pruvis ĉiujn siajn pretendojn, li havis perfektan ekskuzon pri ĉiuj katastrofoj. Kaj returniĝi jam estis neeble — la esploro por iu nerezistebla armilo devis daŭri. Komence ĝi estis lukso, por mallongigi la militon. Nun ĝi estis neceso, se ni volis venki.

Ni defendis nin, kaj tion faris ankaŭ Norden. Li decidis renovigi sian prestiĝon kaj tiun de la Esplora Stabo. Sed ni trompiĝis jam dufoje, kaj ne volis denove erari. Sendube la dudek mil sciencistoj de Norden produktos multe da pluaj armiloj, sed ni restis ne-impresitaj.

Tamen ni malpravis. La fina armilo estis io tiom mirakla, ke eĉ nun mi apenaŭ povas kredi, ke ĝi ekzistis. Ĝia senminaca, simpla nomo — la Eksponenca Kampo — diras nenion pri ĝiaj realaj ebloj. Iuj matematikistoj de Norden malkovris ĝin esplorante — pure teorie — la proprecojn de la spaco. Je ĉies surprizo la rezultoj estis fizike realigeblaj.

Malfacilas klarigi la funkciadon de la Kampo al nesciencistoj.Laŭ la teknika priskribo "ĝi kreas iun eksponencan kondiĉon de la spaco, tiel ke iu distanco finita en la normala lineara spaco povas fariĝi nefinita en la pseŭdospaco". Norden prezentis analogion, kiun kelkiuj el ni trovis utila. Kvazaŭ oni prenus platan gumdiskon — regionon de la normala spaco — kajeltirus ĝian centron ĝisinfinite. La perimetro de la disko restus la sama, sed ĝia "diametro" estus senfina. Ion similan faris la Kampo-generatoro al la spaco ĉirkaŭanta ĝin.

Ekzemple, oni supozu, ke la ŝipo portanta la generatoron estas ĉirkaŭata de malamikaj ŝipoj. Se ĝi enŝaltas la Kampon, ĉiu malamika ŝipo pensas ke ĝi — kaj la ŝipoj ĉe la transa flanko de la ringo — subite malaperis. Tamen la perimetro de la ringo estus la sama, nur la vojaĝo al ĝia centro daŭrus infinite, ĉar dum la progresado antaŭen la distanco ŝajnus ĉiam pli granda, laŭ la modifo de la "skalo" de la spaco.

Tio estis situacio inkubeca, sed tre utila. Neniu povis atingi la ŝipon, kiu kunportis la Kampon. Meze de la malamika ŝiparo ĝi estus tiel netuŝebla, kvazaŭ ĝi estus aliflanke de la Universo. Kompreneble ĝi mem ne povus ataki sen elŝalti la Kampon, sed eĉ tiam ĝi havus avantaĝojn, kaj en defendo, kaj en atako. Ĉar la ŝipo, havanta la Kampon, povus alproksimiĝi al la malamika ŝiparo sen esti malkovrita, kaj subite aperi meze de ĝi.

Ĉifoje la nova armilo ŝajnis sendifekta. Memkompreneble ni serĉis ĉiujn eblajn kontraŭargumentojn, antaŭ ol akcepti ĝin. Bonŝance, la aparato estis sufiĉe simpla, kaj ĝi ne bezonis grandan personaron por esti funkciigata. Post longa debato ni decidis ekprodukti ĝin, ĉar ni konsciiĝis pri tio, ke tempo jam malmultas, kaj la milito rezultos malfavore por ni. Ni jam perdis preskaŭ ĉiujn niajn antaŭajn gajnojn, kaj la malamikoj plurfoje atakis eĉ nian Sunsistemon.

Ni sukcesis teni for la malamikojn dum la tempo bezonata por reekipi la ŝiparon kaj disvolvi la novan batalteknikon. Por uzi la Kampon praktike, necesis detekti iun taĉmenton de la malamikoj, fiksi trajektorion kruciĝantan kun la ilia, kaj enŝalti la generatoron — por kalkulita tempo. Se la kalkuloj estis ĝustaj, elŝaltinte la Kampon oni troviĝus meze de la malamikoj kaj povus grave damaĝi ilin dum la rezultinta konfuzo, kaj retiriĝi sammaniere, se necese.

La unuaj manovroj eksperimentaj rezultis bonege kaj la aparato ŝajnis esti fidinda. Ni plurfoje simulis atakojn kaj la ŝipanaroj komencis adaptiĝi al la nova tekniko.

Ĉeestinte unu de la provaj flugoj, mi vive memoras la impresojn kiujn mi havis, kiam oni enŝaltis la Kampon. La ŝipoj ĉirkaŭ ni ek-etiĝis, kvazaŭ ili troviĝus sur la surfaco de etendiĝanta veziko. Post momento ili tute malaperis.La samon faris ankaŭ la astroj — la Galaksio tamen restis videbla kiel malforta lumzono ĉirkaŭ la ŝipo. La virtuala radiuso de nia pseŭdo-spaco fakte ne estis senfina, ĝi longis kelkcent-milojn da lumjaroj, sekve la distancoj ĝis la plej foraj astroj de nia sistemo nur iom pligrandiĝis — kvankam la plej proksimaj tute malaperis.

Sed oni devis ĉesigi tiujn ekzercojn antaŭ ilia planita fino, kaŭze de tuta serio da teknikaj perturbetoj en variaj pecoj de la aparataro, nome en la komunikaj cirkvitoj. Tiuj estis ĝenaj, sed ne gravaj. Tamen oni decidis reiri al la Bazo por forigi ilin.

Tiam la malamikoj komencis evidente decidan atakon kontraŭ la fortikaĵo-planedo Iton, ĉe la limo de nia Sunsistemo. La ŝiparo devis ekbatali antaŭ ol oni farus la riparojn.

La malamikoj verŝajne kredis, ke ni malkovris la sekreton de nevidebleco — kaj certasence ili pravis. Niaj

ŝipoj aperis subite el nenio, faris egajn damaĝojn — dum kelka tempo. Kaj tiam okazis io tute surprisa kaj neklarigebla.

Mi estris la flugŝipon Hirsania, kiam la perturbo komenciĝis. Ni operaciis sendepende, ĉiu unuo kontraŭ iu fiksita celobjekto. Niaj detektiloj malkovris malamikan ŝiparon je meza distanco, kiun la navigaci-oficiroj mezuris tre akurate. Ni fiksis la trajektorion kaj enŝaltis la generatoron.

La Eksponenca Kampo estis enŝaltita tiumomente, kiam ni devis troviĝi meze de la grupo de malamikaj ŝipoj.

Je nia konsterniĝo, ni aperis en la normala spaco ne tie, sed je distanco de plurcent kilometroj — kaj kiam ni trovis la malamikojn, ankaŭ ili estis detektintaj nin. Ni retroiĝis kaj ekprovis denove. Ĉifoje ni aperis tiom malproksime de la malamikoj, ke ili detektis nin pli frue, ol ni ilin.

Evidente ekzistis iu serioza problemo. Ni provis kontakti la ceterajn ŝipojn de la ŝiparo por ekscii, ĉu ankaŭ ili havis la saman malfacilaĵon. Sed ni ne sukcesis — kaj ĉifoje la fiasko estis tute nekomprenebla, ĉar ŝajne ĉiuj interkomunikiloj funkciis perfekte. Ni devis supozi, kvankam tio tute ne verŝajnis, ke la ceteraj unuoj de la ŝiparo estis detruitaj.

Mi ne volas priskribi la scenojn okazintajn, kiam la dispersitaj unuoj de la ŝiparo returniĝis al la Bazo. La perdoj estis fakte negravaj, sed la ŝipanaroj estis tute demoralizitaj. Preskaŭ ĉiu perdis la kontakton kun la aliaj kaj spertis, ke la navigadaj aparatoj misfunkcias. Evidentis, ke la Eksponenca Kampo kulpas je tio, malgraŭ la fakto ke la problemoj ekestis nur post ĝia elŝalto.

La klarigo estis trovita tro malfrue por ke ĝi utilu al ni, kaj la fina malsukceso de Norden ne konsolis nin pro la definitiva perdo de la milito.

Kiel mi jam klarigis, la Kampo-generatoro radiale distordis la spacon, la distancoj ŝajnis ĉiam pli grandaj, dum oni proksimiĝis al la centro de la artefarita pseŭdo-spaco. Kiam oni elŝaltis la Kampon, la kondiĉoj renormaliĝis.

Sed ne tute. Neniam eblis precize refari la antaŭan staton. En- kaj elŝalti la generatoron signifis longigi kaj mallongigi la ŝipon kiu portis ĝin, sed montriĝis histereza efiko. La eliraj kondiĉoj neniam estis precize refareblaj, sekve de miloj da elektraj ŝanĝiĝoj kaj modifoj surborde dum la funkciado de la Kampo. Tiuj malsimetrioj kaj deformiĝoj amasiĝis, kaj kvankam unuope ili malofte superis onon de procento, tio, sume, sufiĉis. Tio signifis, ke la preciza distanco-mezurilaro kaj la cirkvitoj de la interkomunikilo komplete fuŝiĝis. Neniu sola ŝipo estus kapabla malkovri tiun ŝanĝiĝon; nur kompare al la aparatoj de iu alia ŝipo, aŭ provante komuniki kun ĝi, oni povis detekti, kio okazis.

Ne eblas priskribi la rezultintan ĥaoson. Neniu ero de iu ŝipo konsidereblis certe funkcii en alia ŝipo. Eĉ la plej simplaj meĥanikaj partoj ne estis plu interŝanĝeblaj, kaj la provizado per rezervaj pecoj iĝis neebla. Post iom da tempo ni probable estus superintaj tiujn malfacilaĵojn, sed jam estis atakantaj miloj da malamikaj ŝipoj, kun armiloj kiuj ŝajnis esti postrestintaj je jarcento kompare al la niaj. Nia grandioza Ŝiparo, kripligita per nia propra scienco, batalis heroe ĝis ĝi devis kapitulaci. La ŝipoj ekipitaj per la Kampo restis nevundeblaj, sed kiel batalantaj unuoj ili estis preskaŭ senutilaj. Ĉiufoje kiam ili enŝaltis la generatoron por fuĝi antaŭ la atako de la malamiko, pliiĝis la deformiĝo de la aparataro. Unu monato pasis ankoraŭ, kaj ĉio estis finita.

Jen la vera historio de nia malvenko. Mi rakontis ĝin sen iu ajn intenco anticipi mian defendon antaŭ la Tribunalo. Mi faris tion, kiel dirite, por refuti la kalumniojn lanĉitajn kontraŭ la viroj batalintaj sub mia komando, kaj por elmontri la veran kialon de nia malbonŝanco.

Fine, jen mia peto, kiun mi prezentas — kiel la Tribunalo mem certe rekonos — tute ne frivole, kaj kiu, mi esperas, estos koncedita.

La Tribunalo certe scias, ke la kondiĉoj en la malliberejo kaj la senĉesa inspektado estas iom deprimaj. Tamen mi ne plendas pro tio, nek pro la fakto, ke sekve de la nesufiĉo de ejoj ni loĝas duope.

Sed mi ne respondecos pro miaj estontaj agoj, se mi ankaŭ plue devos dividi mian ĉelon kun profesoro Norden, la eksa estro de la Esplora Stabo de nia armeo.

(1951)

El la angla: Endre DUDICH

LEGANTARA KONFERENCO EN SURGUT

„...Dek jarojn mi verkas, sed ankoraŭ neniam alvenis iu diranta ion pri miaj herooj literaturaj, neniam iu sidiĝis apude por diskuti, kontraŭdiri mian opinion aŭ konsenti ĝin. Mi verkas, oni legas — kaj fino..." — tiu frazo de István Nemere estis kvazaŭ premiso por la organizantoj kaj partoprenantoj en la legantara konferenco pri liaj Esperantlingvaj verkoj, okazinta kadre de la vica Literatura Semajnfino, organizita ĉifoje en SURGUT (Tjumena regiono en Sovetio). La konferencon komencis la prezidanto de la loka Esperanta Klubo, Vladimir Opletajev, skizante la vivon kaj verkaron de la populara aŭtoro. Sekvis kvin pliaj raportoj, el kiuj tri estis dediĉitaj al lia plej sukcesa romano „La blinda birdo".

La raportojn sekvis vigla, foje eĉ akra diskuto, montrinta la intereson de la legantoj, kiuj akcentis la sendubajn pensigan kaj moralan rolojn de liaj romanoj, kvankam la opinioj pri la pozicio kaj socia engaĝo montriĝis malsamaj... Tiu ĉi konferemco ne estis la unua tiatipa en Uralo. Jam okazis similaj pri Vladimir Varankin kaj lia „Metropoliteno" (1983), Johán Valano (1984) kaj Lorjak (1985). Ili servas al pli kohera situacio en la sistemo verkisto-leganto, kiu ŝajnas aspekti en la Esperanta mondo ne tute bona.

La konferenco estis la kerna, tamen ne la sola araĝo de la Literatura Semajnfino, okazinta je La Tago de la Esperanta Libro (1985-12-14/15) kun iom pli ol 30 partoprenantoj el kelkaj Mez-Uralaj kaj Tjumen-regionaj urboj. La direktoro de la Komuna Esperanta Biblioteko (KEB) Galina Gorecka (Sverdlovsk) interese rakontis pri la Esperanta libroeldonado kaj garnis ĝin per ekspozicio bazita sur la materialo de KEB kaj de la plej granda Urala biblioteko „Belinskij". La ĉefredaktoro de „Sezonoj" prezentis raporton pri la literatura kritiko en Esperanto, kaj Dmitrij Prohorenko (Surgut) omaĝis la 126an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof per lia vivoskizo.

Aleksandr Korĵenkov

István Nemere

LA TREZORO

8. Oni solvas la enigmojn

„Malantaŭ la duobla pordo... dum sunleviĝo" — diris Petro laŭte. Eble nur por kuraĝigi siajn kunulinojn. Onklino Gracia tremis, de tempo al tempo brue kunbatetiĝis ŝiaj malmultaj dentoj. Laŭra spasme tenis la brakon de sia edzo.

Tiel pasis la tempo. Super la arboj jam ekaperis la aŭroro. En la domo foje-foje ekkraketis planko aŭ ŝtupo. Tiuj tri homoj jam treege atendis la mateniĝon. Petro vidis tra la fenestro: oriente grizas la ĉielo. Sed la steloj ankoraŭ ne malaperis. Li ĝemis.

Poste tamen alvenis la ĝusta tempo. Super la arbaro ili vidis ruĝflavajn radiojn, kiuj lumigis nubetojn similajn al vualoj. Post kelkaj minutoj la unua malkuraĝa lumeto ripozis jam sur la tegmento de la domo.

Petro malfermis la pordon; ili eniris pli malgrandan ĉambron. Onklino Gracia kaj Laŭra kaptis la manon unu de la alia.

Tra la kontraŭa fenestro ekaperis la unuaj radioj de la leviĝanta suno. La ĉambro fariĝis pli hela. Ie fermiĝis pordo — sed ili triope ne aŭdis tion. Nenion ili aŭdis, tutkorpe tremantaj ili rigardegis la unuan radion. „Turniĝas la Tero — pensis Laŭra — rapidege ĝi flugas en la kosmo, ĝi iom turnas sin kaj tiu eta radio nun ĉiam pli suben migras sur la muro..."

Petro vidis: la unua sunradio tra la fenestro projekciiĝas super la duobla pordo. Ene fariĝis ĉiam pli hele. Tiu ruĝblanka lummakulo kvazaŭ gluiĝis al la muro, ĝuste super la pordo...

Petro tuj alpaŝis, elprenis sian poŝan tranĉilon. Per ĝi li frapetis la muron. Tie, kie vidiĝis la lumo, la muro sonis alie. Li profunde enspiris la aeron, poste provis la tranĉilon enigi en la muron... Ĝi preskaŭ senbare eniĝis! Gipso falis sur la plankon. Malantaŭe, je grandeco de duonbriko, estis eta kavaĵo, kiun la iama posedanto — lia neniam vidita-konata bopatro! — per gipstavolo provis kaŝi... Sube videblis ligna lameneto..

— Jen! — diris Petro.

— Bonege! — diris iu vira voĉo. En la ĉambro subite aperis kvin aŭ ses viroj. Ĉiu el ili havis enmane pistolon:

— Levu la manojn!

Petro tiel ekmiris, ke li eĉ forgesis timi. De kie aperis tiuj fremduloj, ĉu el sub la planko, el la fendoj de la muroj? Laŭra faligis sian mansaketon. Onklino Gracia nenion komprenanta turnadis la kapon, kvazaŭ akva birdo:

— Ki... kiu... vi estas?

— La posedantoj de la trezoro — prezentis sin unu el ili. Du viroj ridegaĉis. Ankaŭ ili montris siajn pistolojn. La lumo de la leviĝanta suno penetris en la ĉambron, ĉio fariĝis ruĝa.

— Tiu forkondukis min — Laŭra montris al unu el la viroj. Ŝi sendube rekonis lin. Tiu telefonis al Petro, tiu postulis transdoni la tekston de la testamento. Videble vane ili ekhavis ĝin, tamen ne trovis la trezoron...

La koro de Petro bategis engorĝe. Do, ĉio perdita? Vane ili triope suferis kaj serĉis tiel longe?

La ĉefo de la banditoj elprenis tranĉilon. Liaj kunuloj tenis la pistolojn direktitajn al la du virinoj kaj Petro. Sed en la momento, kiam la tranĉilo de la ĉefo eligis el la muro la lignan lameneton, ĉiu observis lian manon. Eĉ la banditoj anstataŭ la kaptitojn — rigardis ĝuste lin. Petro pensegis: nun, ĉimomente ni devus fari ion kontraŭ ili...

Kaj tiam vere okazis io.

Brue rompiĝis kelkaj fenestrovitroj. Korpoj eniĝis tra la pordoj. Ekaperis uniformoj kaj armiloj...

— Polico! Forĵetu la pistolojn!

— Ĉiu forĵetu, tuj...!

Kiam la banditoj rekonsciiĝis el sia ega konsterniĝo, oni jam senarmigis ilin. Ekklaketis la katenoj. La tranĉilo de la ĉefa bandito falis sur la plankon. Tiu, kiu levis ĝin, estis civile vestita viro. Li estis larĝŝultra, blonda, svelta juna homo kun kvazaŭeglekta korpoteno.

— Tiu sinjoro liberigis min el la manaĉoj de la banditoj! — kriis Laŭra ĝoje, poste iom konfuzita ŝi aldonis: — Antaŭ minuto... jam la duan fojon.

— Mi salutas vin — diris la junulo. Dumtempe liaj kunuloj, la policanoj forkondukis la katenitajn banditojn. Ekaperis sinjoro Blio, frotanta la manojn. La banditoj ankoraŭ vespere kaptis, ligis kaj ŝlosis lin en la kelo. Nun la policanoj lin liberigis. La okuloj de onklino Gracia ekbrilis. La junulo daŭrigis: — Mi estas

leŭtenanto Corrio. Jam de kelkaj monatoj mi gvidas la enketadon de tiu ĉi afero.

— Sed verdire... kio okazis? — Petro nur nun, kun ioma malfruiĝo demetis siajn levitajn brakojn. Li estis tute ŝokita, ja la eventoj tiel rapide okazis unu post la alia.

— Depost kelkaj monatoj ni kaŝobservis vin ĉiujn — komunikis al ili Corrio. Sian pikan rigardon li ĵetis foje al Laŭra, foje al Petro, eĉ al Gracia. — Ne miskomprenu la aferon, ni ne suspektis vin. Sed ni sciis, sinjorino Laŭra, ke al la spuroj de la banditoj ni povos alveni nur pere de vi. Sinjorino, via patro estis dangera ulo. Antaŭ jaroj kun siaj kunkulpuloj li ŝtelis la mapojn de novaj submaraj naftodonaj terenoj antaŭ nelonge malkovritaj en la regiono de la Norda Maro. Tiujn indikojn la registaro volis ankoraŭ teni en sekreto. Via patro mikrofilmigis la mapojn kaj diris al siaj kunuloj, ke li forveturas por vendi ĝin al iu eksterlanda bursa asocio. Sed samtempe li sciigis la registaron, ke por sufiĉe granda sumo li eventuale redonus al ni la filmon. Se en la eksterlandaj bursoj oni estus eksciintaj pri niaj novaj naftodonaj terenoj, la prezo de nafto en la tuta monda merkato estus tuj falinta katastrofe... Ni jam komencis traktadi kun li pere de diversaj nekonataj kaj suspektindaj uloj, kiam li subite fuĝis de siaj kunuloj, por reteni ĉion por si, nur por si... Li longe kaŝis sin, sed vidinte, ke kaj la polico, kaj la banditoj lin persekutas, li decidis kaŝi la „trezoron". Ĉu eble li volis denove fuĝi eksterlanden? Ni neniam tion ekscios jam. Intertempe li eksciis, sinjorino, ke vi edziniĝis, kaj eble li volis restigi la trezoron en la lando, donaci ĝin al vi, se io estus okazonta al li mem... Nu, ni, la polico, observis vin ĉiujn kaj kelkfoje rimarkis, ke ankaŭ la banditoj faras same. Ankaŭ ili sciis, ke pere de vi ili ekscios, kie estas la mikrofilmo. La polico kelkfoje intervenis, kiam vi... hm... falis en danĝeran situacion.

— Ni dankas — flustris Laŭra.

— Ni konstante postsekvis vin kaŝe. Tiam, kiam vi ekveturis al tiu ĉi vilaĝo, ni jam konjektis, ke nun sekvos la fino de la batalo. Pro tio ni mobilizis ankoraŭ multajn policanojn, kaj post noktomezo ni ĉirkaŭis tiun ĉi domon. Kaj jen — Corrio per la tranĉilo deprenis la lameneton. En eta skatoleto kaŝiĝis la mikrofilmo. La viro elprenis ĝin, tenante kontraŭ la lumo disigis kaj trarigardis ĝin, poste kontente kapjesis:

— Jes, estas ĝi. La registaro ĝojos.

— Do ni... ni nenion havos el la trezoro? — demandis onklino Gracia. Leŭtenanto Corrio enpoŝigis la filmon kaj montris ĉirkaŭen:

— Jen tiu ĉi domo... Ĉar la filmon ni reakiris pere de via helpo, mi proponos al la registaro, ke kiel premion vi ekhavu la domon. — La leŭtenanto nun faris malpli oficialan mienon. Li eĉ ridetis kaj venis pli proksimen, etendis la manon al ili: — Ĝis revido!

La policanoj forveturis. Blio akompanis ilin al la pordego, rigardis, kiel ili malproksimiĝas perpiede kaj aŭte. La arbaro por momento pleniĝis je bruo, krioj. Poste denove fariĝis silente.

— Do, ĉu tio ĉi estas nia heredaĵo? — Laŭra iris al la teraso. Petro postsekvis ŝin. La suno jam estis leviĝinta. La birdoj kantetis. Eta vento blovetis inter la branĉoj. Lumo plenigis la ĉielon, la pejzaĝon. Ĉio ĉi estis mirakla vidaĵo. Ili enspiris la vivigajn odorojn.

Petro ĉirkaŭbrakis sian edzinon:

— Mia karega... Ja ni ĉiam revis ĝuste pri tio! Loĝi meze de arbaro, ne en malbelega urbo... Loĝi rande de vilaĝo, en bela ĉirkaŭaĵo... ĉu ni povus havi pli bonan heredaĵon? Via patro ĝuste tion volis doni al ni, ne la filmon. Memoru la tekston de lia testamento: „Bonege ĝin flegu... ĝi donos al vi forton..." Jes, belega domo, mirakla hejmo por ni!

— Vi pravas, karega — ŝi respondis flustre. Kaj ili staris, banantaj la vizaĝon en la lumo.

Onklino Gracia rigardis la alirantan sinjoron Blio:

— Diru, kara sinjoro, ĉu vi havas edzinon?

— Ne, sinjorino... ankoraŭ ne.

— Tiel mi esperis — alkomunikis Gracia ridetante, kaj signifplene, tre signifplene ŝi rigardis en la okulojn de la viro.

Fino

HAVINDA KANTARO

József Dinnyés: AL VENKO! 16 kantoj kun muziknotoj. Librofine suplemento kun Esperanta-hungara vortareto, enhavanta ĉiujn vortojn de la kantoj. Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1986. 21 cm, 24 p. Prezo: 6,- ned. gld. (Por Hungario: 18,- Ft)

Ĉiuj kantoj en la kajero estas komponaĵoj de József Dinnyés, populara hungara kantisto, kiu lastatempe fariĝis konata en Esperantujo. Kelkaj tekstoj devenas de li mem kaj de hungaraj poetoj (tiujn tradukis Imre Szabó), sed aperas en la kajero ankaŭ muzikigo de poemoj de Baghy, Ito Saburo, Deij kaj Schwartz.

EMG ELEKTRONIKAJ INSTRUMENTOJ AL LA INDUSTRIO



1

Estas bone konate, ke post la elektrotekniko, estis la elektroniko kiu revolucie invadis la tutmondan industrion per siaj altprecizaj, surprize rapide kaj efikplene utiligeblaj instalaĵoj. Efektive ili revoluciigis la industrion, kaj kvazaŭ aldone ankaŭ la sciencajn esplorojn, la laboratoriojn ĉu de la universitatoj, ĉu de la pli zorge laborantaj entreprenoj. Elektronikajn aparatojn kaj mezurinstrumentojn bezonas nuntempe nenombreble multaj industriaj taskoj: por mezuri kaj ekzameni, reguli kaj direkti, ĉiupaŝe, eĉ ĉiugrade necesas la uzado de ĉi tiuj iloj.

Precipe grava montriĝis tiu industria branĉo, kiu produktas por la aliaj branĉoj kaj al la scienca sfero la elektronikaĵojn, la instrumentojn kaj aparatojn. Se la taskojn pri mezurado, pri direktado kaj tiel plu, la uzontoj jam difinis, restas plua tasko, aperanta ĉe fabriko de tiaj instrumentoj, science solvi, poste inĝeniermaniere — do teknike — projekti kaj produkti la bezonatajn novajn elektronikaĵojn. Novigoj kaj inventoj en tiu ĉi branĉo estas kvazaŭ ĉiutagaĵoj, vere vivigaj elementoj de la fabrikado. Por interesiĝanto de la moderna tekniko, de ties novaj direktoj certe prezentas rimarkindajn momentojn se li trarigardas iomete la produktogamon de prestiĝa entrepreno, kiel la *Fabriko de Elektronikaj Instrumentoj.*

Oni tuj rimarkas, ke tiaspeca fabriko ne povas kontentiĝi sole per la fabrikado de elektronikaj mezuriloj, t.e. instrumentoj kaj sistemoj por mezurado. La alta intelekta kaj teknika bazo de la fabriko destinas ĝin ankaŭ mem subteni la elektronikan industrion, preparante por ties laborejoj multajn instrumentojn porteknologiajn. Videble, temas pri teknika servado por sia propra branĉo — kio estas pensiga afero pri la atendebla kvalito de la tuta produkto en tiu ĉi fabriko.

Krom tiu grupo de l' elektronikaj instrumentoj ekzistas kompreneble vasta kampo de la plej diversaj elektronikaĵoj. El ili la fabriko elektis por si la organizan teknikon kaj produktas aparatojn por inĝenieraj kaj administraj direktadoj, ebligantaj la mekanizadon de tiuj ĉi laboroj. Speciala, sed ekonomie tre grava kampo estas ankaŭ kultivata en la fabriko, nome la elektronikaj aparatoj, regulantaj ilmaŝinojn.

Post tiu skiza grupigo ni revenu al la unue menciitaj produktaĵoj, do al la tradicie uzataj elektronikaj mezurinstrumentoj. Kiel konate, ili servas kiel bazo al ĉiaj modernaj teknikaj kaj esploraj mezuradoj, sekve ili apartenas al la baza produktogamo: sinus-generiloj, impulso- kaj funkciogeneriloj, osciloskopoj, mezuriloj de moduladoj, de distordoj, analiziloj multkanalaj.

El inter la menciitaj instrumentoj indas iom skribi pri la programebla funkcio-generilo de tipo 12567 *(foto 1.)* Per ĝi produkteblas en la frekvenco-intervalo inter 0,01 Hz kaj 10 MHz la funkcio-generaj bazsignaloj (sinusa, triangula, kvarangula, impulsa, segila). Estas konekteblaj ekigaj funkciadmanieroj (TRIG, GATE, BURST, PLLxN, PLL+N), krome modulaj funkciadmanieroj (AM, FM, LIN/LOG, SWEEP, VCO), kiuj prezentas tre grandan liberecon por krei ĉiujn necesajn signalformojn. En la funkciadmaniero INT X-TAL REF kristalprecize eblas ĝustigi frekvencojn. Kian ajn signalformon eblas krei, respektive ĝustigi, ĝin stori sur magnetbendo kaj ree vidigi; ankaŭ eblas la tutan signalon — aŭ ĝian laŭdezire elektitan eron — reaperigi. La enkonstruitaj interfacoj IEC 625 kaj RS 232C donas eblon por kompleta teleregado en ĉiu ajn funkciadmaniero de la aparato.

La mikroprocesila, inteligenta registrilo de tipo 79815 estas aplikebla kiel grafika periferio de komputiloj, programeblaj kalkuliloj kaj ĉiaspecaj elektronikaj mezursistemoj por registri (kun teksto) konstruitajn kaj kalkulitajn figurojn, datumojn aŭ funkciojn. La aparato vidigas sur paperformato A/3, kies desegnatan surfacon eblas ĝustigi, la karaktrojn kaj grafikaĵojn programadi. Por du-kolora desegnado la aparato mem ŝanĝas plumojn. Altnivelaj instrukcioj helpas la manipuladon por ĝustigi la parametrojn por la desegnado. La aparato havas eniran bufro-storon de 2 Kbajta kapacito; la distingivo estas 0, 1 mm, la morta zono +/- 0,2 mm. La interfacoj (IEC 625, RS 232C kaj Parallel) kontribuas al konektado de sistemoj.



La multkanala analizilo de tipo 38000 estas destinata precipe por la nuklea fiziko, inter aliaj por registri kaj prilabori gama-spektrojn. *(Foto 2.)* Sekve ĝi konvenas ankaŭ por ĉiuj mezuradoj, kiam necesas ege rapide registri kaj prilabori aron da datumoj; ekzemple tio okazas en la neŭtron-spektroskopio, rentgen-spektroskopio, same la biofiziko, krome certaj mezurteknikoj de la maŝinfabrikado bezonas tian rapidege laborantan analizilon. La aparato havas datumstoron kun 8192 kanaloj; ĝi prezentas kvarkanalan impuls-amplitudan analizadon, respektive ok-kanalan plurspecan funkciad-manieron. Ĝia datumprilabora procesilo havas storojn ROM kaj RAM (de 64 Kbajtoj), kiuj estas programeblaj helpe de BASIC-lingvo, kompletigita per por-analizilaj instrukcioj.

La fabriko provizas — kiel supre menciite — la elektronikan industrion per teknologi-celaj mezurinstrumentoj. Gravas inter ili la duonkonduktilojn ekzamenantaj instrumentoj, la vidigiloj de duonkonduktilaj karakteristikoj, la signal-analiziloj kaj specifaj mezursistemoj.

La lineara IC-ekzamenilo de tipo 19680 *(foto 3.)* kapablas multflanke aŭtomate kaj tre rapide mezuri, krome klasifiki kaj selekti. Helpe de la abundaj linearaj IC-iloj la aparato estas taŭga por la plej multaj praktike bezonataj ekzamenadoj. La testprogramojn eblas facile enigi per klavaro interaktive; tamen mem la aparato enhavas ankaŭ multajn testprogramojn, preparitajn de la fabriko. La mezuritaj datumoj bone legeblas sur granda vidigilo; ĉiuj ĉi estas dokumenteblaj ankaŭ per eksteraj aparatoj, helpe de internaj interfac-cirkvitoj. Por seria ekzamenado eblas alkontakti dozigilon. La ekzamenitajn integritajn cirkvitojn la aparato klasifikas laŭ kvin klasoj, surbaze de la programitaj ecoj.

Integritaj cirkvitoj LSI kaj VLSI estas diĝite ekzamenataj per la altkvalita aparato de tipo 19700 *(foto 4.)*. Ĝi kapablas ekzameni maksimume 64 piedajn diĝit-cirkvitojn LSI „malplejbon-kaze", kontrolante la DC-parametrojn kaj funkciadojn per testrapido de 5 MHz kaj en 500 ps tempoeroj. La programkreado estas simpla afero, faciligita de mezurcela programlingvo ATLSI ene de disk-operacia sistemo (DOS); tiu altkvalita sistemo igas pli taŭga ankaŭ la uzadon de memkontrol-testoj, respektive de aŭtentikigaj testoj. Ekzamenante LSI-memoriojn, mikroprogramita procezilo produktas — internacie uzatajn — signalformojn. Per ili eblas mezuri RAM 256 Kx8 bitojn, ROM, PROG, EPROM, EAROM 64 Kx8 bitojn.

Speciala procezilo elaste kontrolas laŭkatalogajn LSI-cirkvitojn, mikroprocezilojn, periferiajn ĉipojn kaj ŝablonojn de la uzanto. Cetere, la instrumento per norma interfaco kaj programoj adapteblas al la sistemoj SAD, CAT kaj CADMAT. Eningitaj cirkvitoj estas ekzameneblaj pere de aŭtomata dozigilo, same segmente mezuri pere de segment-mezurilo; tiuj ekzamenoj estas konvene plenumeblaj ĉu en la fabrikoj de integritaj cirkvitoj, ankaŭ serie, ĉu ĉe la utiligantoj de tiuj cirkvitoj por kontroli la ricevitajn kaj uzotajn.

Estas fabrikataj diversaj vidigiloj de karakteristikoj, el inter kiuj estu menciata la diĝit-stora karakteristiko-vidigilo kaj -analizilo de tipo 1577. vekas intereson ĉe tiu instrumento la maniero, per kiu ĝi transformas diĝite la analogajn signalojn (tensio, kurento) por daŭra storado. La tiel storitaj datumoj estas diversmaniere grupigeblaj por specialaj vidigoj (ekzemple samtempe vidigante du aŭ plurajn karakteristikojn de diversaj iloj en aparta aŭ sama koordinato-sistemo, eventuale sinsekve vidigi samtempe 16 grafikaĵojn.

La aparato enhavas elektronikan generatoron por indiki tolerojn kaj senĝenigilon en la kurento. La baza mezurilo ebligas mezuri ĝis 1600 V kaj 16 A, per la alttensia suplemento eĉ ĝis 1000 A. Kompreneble la enir-elir-transiraj karakteristikoj de la duonkonduktiloj estas ankaŭ registreblaj.

La plej konvena ekzamenilo de mikro- kaj mini-procezciloj, kombinitaj kaj sekvencaj retoj, rel-sistemoj estas la mikroprocezila logika stato-analizilo de tipo 10690. Ĝi permesas al la ekzamenanto sekvi la funkciadon de la observata sistemo, do tiel rimarki kaj elimini eventualajn misaĵojn de la aĵoj kaj programoj. La aparato laŭdezire registras en memorion la parton de l' enira impulsaro, kaj vidigas ĝin ĉu mnemonike, ĉu tempdiagrame. Koncerne la plej vaste uzatajn mikroprocezilojn ekzistas fakultative utiligeblaj enir-unuoj (8080, 8085, Z80, 8086).

La presitaj cirkvit-kartoj bezonas multe da permana laboro ĉu por mezuri kaj kontroli, ĉu por ripari ilin. Estas tre utile se oni ŝparas la tempon kaj koston tiurilate per instrumentoj. Tiun ĉi celon servas bonege la mezuraŭtomato de tipo 19400 *(foto 5.)*, kiun regas komputilo kun encirkvita testilo. Eblas certagrade kontroli ankaŭ la funkciadojn de la muntitaj-presitaj cirkvit-kartoj. Per encirkvita ekzamenado eblas trovi blokitan kaj rompitan cirkvitojn, la mankantan, eraran aŭ fuŝitan erojn, ankaŭ kontroli la funkciadkapablojn de la integritaj cirkvitoj. Gravas, ke dum ekzamenado de iuj eroj, ili preskaŭ apartiĝas de aliaj eroj en la propra cirkvito: tio estas rezulto de gardo-cirkvitoj kaj impulso-mezurado.

Depende de la muntado eblas mezuri 1024 analogajn, aŭ 960 diĝitajn, aŭ 480 hibridajn plus 32 analogajn punktojn. la plej granda dimensio de la kartoj estas 330x432 mm. Najlo en pneŭmatika ĉuko plenumas la mezuradon sur la kartoj, kompreneble tute aŭtomate, eĉ por si mem produktante la testprogramojn. Memkontrolaj programoj servas por kontroli sian propran laboron. Grave malpliiĝas do pere de tiu instrumento la daŭro ĉe ĉia ajn manipulado koncerne la muntitajn-presitajn cirkvit-kartojn.

Laborojn de inĝenieroj subtenas pluraj produktaĵoj de la fabriko EMG. Por teknikaj sciencaj kalkuladoj, regi mezur-instrumentojn, datumojn prilabori bone servas la programebla grafika komputilo de tipo 777 D. Helpe de grafika kompletigilo ĝi kapablas la menciitajn taskojn grafike vidigi, ankaŭ du-dimensiajn funkciojn prezenti. Tiu ĉi multkapabla instrumento konsistas el mikroprogramita bitsegmenta ĉefprocezilo (AM 2901) kaj tri periferiaj proceziloj (INTEL 8085). La periferioj en la aparato: alfanumera-grafika vidigilo kun 31 cm diametro, kaj du mezur-interfacoj. La aparta tajpil-klavaro konktiĝas per kablo, same la alfanumera-grafika larĝpresilo. Ampleksigita BASIC servas kiel programlingvo, t.e. ĝia abundigo per instrukcioj en rilatoj de rikordmanipulado, mezurad-regado, grafikaĵoj, matric-manipulado, ĉenoj kaj per plivastigitaj stokoj de funkcioj. Helpe de tiu ĉi multescia instrumento iĝas pli facila kaj rapida la inĝeniera, teknika projektado!

Por regi ilmaŝinojn surbaze de programoj, eminente taŭgas — laŭ multaj spertoj de maŝnfabrikaj fakuloj — la mikroprocezilaj regadoj de tipo HUNOR. Depende de la tipo temas pri 2-5 aksaj, 0,01-0,001 mm-an precizecon plenumantaj regadoj ĉe kontinu-kurentaj, respektive asinkron-servomotoraj ilmaŝinoj. Ĉiujn karakterizas la permana programeblo, kiun oni facile faras per klavaro. Al la diversaj ilmaŝinoj (tornilo, frezilo, akrigilo, randofleksilo, nana prilaborilo ktp.) estis adaptitaj diversaj regadoj, krome la enigitaj fiks-cikloj laŭmaŝinaj, kaj la geometriaj kalkuloj por korekti movdirektojn de la iloj, multe faciligas la utiligon de la regado. Ĉiuj servoj de la regado akomodiĝas al la teknologiaj bezonoj de la regata ilmaŝino. Enkonstruita alfanumera indikilo, aplikebla vidigilo kaj programoj depreneblaj de sur trubendo, magnetbendo aŭ iu programpreparilo, ĉiuj bone kontribuas al la multrilata adapteblo de tiu regado. *(foto 6.)*

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Produktas:
FABRIKO DE
ELEKTRONIKAJ INSTRUMENTOJ „EMG"
H-1163 Budapeŝto XVI.
Cziráky u. 26.
Telefono: (1) 837-950
Telekso: 22-4535

1 Programebla funkcio-generilo (tipo 12567)
2 Multkanala analizilo (tipo 38000)
3 Lineara IC-ekzamenilo (tipo 19680)
4 Diĝita IC-ekzamenilo por LSI, VLSI (tipo 19700)
5 Enircirkvita testilo (tipo 19400)
6 HUNOR-regado de tornmaŝino (tipo PNC 621)





4

EMG


5


6

EMG

D-ro István Nagy

Eŭropa Esperantista Komunumo

La esperantistoj ofte parolas pri la „venko" de Esperanto, kiam maturiĝos la frukto de ilia laboro. Tiam la modestuloj jam ne bezonos „honti" pri sia esperantisteco, eĉ... ili estos herooj.

Ni scias, ke ĉi tiu tempo ne troviĝas sojle de la hodiaŭo, sed plie antaŭ la pordo kun surskribo: laboro por Esperanto. Mi ne ŝatas la vorton „venko", ĉar Esperanto neniam venkos la aliajn lingvojn, kio cetere absolute ne necesas. Ni klopodu, ke realiĝu ĉio, kio eblas: la egalrajtigo aŭ la egalrajteco de Esperanto kun la aliaj lingvoj. Pri tio ni jam hodiaŭ povas paroli, ekzemple koncerne la esperantlingvajn radio-disaŭdigojn. Ĉi-kampe Esperanto estas absolute egalrajta kun la aliaj lingvoj, per kiuj la radiostacioj elsendas programojn. Ankaŭ sur la tereno de la libroeldonado Esperanto estas egalrajta: la saman nacilingve verkitan libron oni povas traduki en kiun ajn lingvon, do ankaŭ Esperanten.

Se mi jam aludis la radion, mi tiras la atenton de la legantoj al fakto: radiostacioj elsendas en Esperanto ĉiutage aŭ ĉiusemajne kvaronhoron, duonhoron, tri horojn aŭ nur dek minutojn, sed la samaj radiostacioj eĉ kvin minutojn ne oferas en aparta programo el sia elsendotempo por nacilingve konigi Esperanton — mi ne volas uzi la vorton propagandi —, informi la aŭskultantojn pri la lingvo mem. La kompetentuloj nur uzi volas Esperanton kiel aliajn lingvojn por siaj celoj. El tio sekvas, ke la disvastigo de Esperanto estas la tasko de la esperantistoj.

La plej grava tasko estas sisteme — kiel okazis antaŭ kelka tempo en Irano — informi la plej grandan nombron da homoj pri la ekzisto de Esperanto, kaj por tio pleje taŭgas la nuntempaj amaskomunikiloj: gazetaro-radiofonio-televido. Ni venku per ili la nescion, la neinformitecon aŭ la misinformitecon de la mondo pri Esperanto, ĉar tiu, kiu scias nenion pri la lingvo, ne povas esti *indiferenta*, nur *neinformita*. Zamenhof diris, ke ni devas trovi la rimedon por venki la indiferentecon de la mondo. Nu, la rimedoj por tio estas la amaskomunikiloj.

* * *

Jam delonge kuŝas-dormas miatirkeste artikolo, ĉar mi tiel opiniis, ke tiaj ideoj ankoraŭ ne maturiĝis. En HV 6/85 la artikolo de d-ro Andrea Chiti-Batteli kaj tiu de profesoro László Deme solvis la problemon. (La samajn artikolojn mi legis ankaŭ en la hungarlingva revuo „Mondo kaj Lingvo" 4/85.) Mi decidis tralabori la entirkestan artikolon kaj elvolvi mian opinion pri la ebloj de Esperanto sur nia olda kontinento, Eŭropo. Kial ĝuste tie, ja Esperanto estas tutmonda interkomunikilo? Jen kelkaj kaŭzoj: Eŭropo estas la naskiĝloko de Esperanto, tie ĝi faris la unuajn paŝojn, kreskis, evoluis dum cent jaroj, tie ĝi estas nuntempe pleje disvastiĝinta, la interkomunikado (vojaĝoj) de la esperantistoj estas la plej facila pro la relative negrandaj distancoj, tie troviĝas la plej diversaj lingvoj sur relative malgranda teritorio, kaj Eŭropo estas ankoraŭ la centro de la tutmonda movado.

Post la legado de la du aluditaj artikoloj, enpense mi diris al mi: ambaŭ aŭtoroj pravas, sed ni vane atendas, ke la neesperantistoj faros tion, kio ne estas ilia devo. La radiostacioj nur uzas Esperanton, kaj eĉ ne unu libroeldonejo petis la esperantistojn traduki verkon Esperanten aŭ el Esperanto, por ke ili ĝin eldonu. La kompetentaj neesperantistoj maksimume donas iom da helpo, promesas ion — ekzemple instrui Esperanton en la lernejoj, sed la instruadon solvu la esperantistoj —, ankaŭ la politikistoj fojfoje diras belajn vortojn pri la nobla celo de nia lingvo. Vane estis Franz Jonas, iama prezidento de Aŭstrio konvinkita esperantisto, li mem inaŭguris la UK-on en Vieno, Esperanto pro tio ne evoluis pli rapide kaj ne havis privilegiojn en Aŭstrio. Ne multon valoris la belaj eldiroj kaj favoraj opinioj de la papoj pri Esperanto, pri ĝia futuro, sen la laboro de entuziasmaj pastroj kaj fideluloj tute ne estus disvastiĝinta Esperanto en la Eklezio.

Sendube tre, tre gravas la du Rezolucioj de UNESKO, aŭ tiu de Manila pri la rolo de Esperanto en la turismo, por la realigo de la rezolucioj la voĉdonintoj faris kaj faros nenion. Tiuj sinjoroj, kiuj voĉdonis unuanime por Esperanto en Sofio, disiĝis, ili ne okupiĝos pri la organizado de la Centjara Jubileo, ne disponigos por ni amaskomunikilojn. G. Maertens skribas en sia novjara mesaĝo: *„ĉar ĝi* (la Rezolucio) *havos nur tiom da graveco, kiom ni sukcesos doni al ĝi."* Cetere estus ege instrue kaj utile ekscii, kian eĥon havis la dua Rezolucio en la amaskomunikiloj de la opaj landoj? Ĉu entute ili menciis ĝin aŭ prisilentis la tuton kiel negravaĵon?

Flanke de la neesperantistoj, do de kompetentaj instancoj, registaroj, partioj, sindikatoj, ni povas ricevi „helpon" kaj „permeson", sed laboron neniam; fojfoje ankaŭ „promeson", sed la promes-frazoj ĉiam komenciĝas jene: „SE"...

* * *

Por elpaŝi el la nekonateco, la esperantistoj devas altiri al si la atenton de la mondo por ia vere granda, grava evento, agado, faro, kiu daŭros longe. Kiel? Tiel, kiel antaŭ cent jaroj faris Zamenhof: li faris ion tre gravan, ion pli bonan kaj la mondo ekatentis. Per kio Zamenhof altiris la atenton unue en Eŭropo, estas niamane, kaj tio estas Esperanto.

La mondo estas tre granda, sed ne nia kontinento, Eŭropo. Pasintjare aŭtune kunsidis en Budapeŝto la Eŭropa Kultura Forumo. La tri vortoj frapis al mi la okulojn. Iome transformante ilin, jen: Eŭropaj esperantistoj — Esperanta kulturo — Forumo: el tridek tri Eŭropaj landoj kunvenis esperantistaj verkistoj, poetoj, tradukistoj, lingvistoj, eldonistoj...

Unu el la du aŭtoroj de la aluditaj artikoloj parolis pri Eŭropa Komunumo kaj Eŭropa Parlamento; la alia aŭtoro pri la Konsilantaro de Ekonomia Interhelpo. Ili ambaŭ starigis strategion: la unua la „ĝustan", la alia la „proponitan". Ili ambaŭ diris, „kion faru la neesperantistoj por Esperanto!" Ho jes... la afero certe estus pli reala, se nur 1% de la loĝantaro de EK — ĉ. 3,3 milionoj da personoj — estus esperantistoj, (ĉu mi kuraĝu surpaperigi: se 1% havus almenaŭ realan bildon pri Esperanto!), la esperantistoj havus iom da ŝanco, sed... inter ni: kiom da esperantistoj vivas en la landoj de EK? Mi scias kaj mi jam plurfoje diris, ke la forto de Esperanto estas ĝia ideo, ĝia celo, tamen laŭ la historiaj spertoj ideo sen adeptoj ankoraŭ ne venkis.

Kaj koncerne KEI-n, kial ĝuste la hungara registaro okupiĝu pri la disvastigo de Esperanto en la socialismaj landoj? István Sarlós, tiama hungara vic-ĉefministro diris en 1983 salutante la UK-on: „SE" la hungara registaro „ricevos pripensitan kaj respondecan proponon aŭ peton..." Miaopinie la samon dirus kiu ajn registarano. Krome: de kiu venu la propono aŭ peto? Ĉu de alia registaro, de internacia organizaĵo aŭ sufiĉas la organizaĵo de la hungaraj esperantistoj, do HEA? Ĝi certe kapablas fari pripensitan kaj respondecan proponon aŭ peton. Kaj de tiam tri jaroj forfluetis kaj forfluos plu...

Sed ni revenu al niaj ŝafoj.

En 1975 en Helsinki kunvenis 33 Eŭropaj ŝtatoj, krome Usono kaj Kanado; ili subskribis interkonsenton, la Finan Akton de Helsinki, kiu fariĝis la bazo de la kunlaborado de la Eŭropaj popoloj. Ni denove substituu la vortojn: Kunvenis esperantistoj el tridek tri Eŭropaj landoj — Fina Akto de... aŭ Interkonsento aŭ Kontrakto de Eŭropaj Esperantistoj — Kunlaborado. Se la reprezentantoj de la Eŭropaj ŝtatoj, popoloj, registaroj „havis rajton" interkonsenti pri lakunlaborado, kial ne povas fari la samon aŭ kial ne havus la rajton la Eŭropaj esperantistoj aŭ ties reprezentantoj la Landaj Asocioj, fari komunan decidon pri la kunlaborado? Ili havas komunan lingvon kaj komunan celon. Lingve ili tuj komprenas unu la alian, kaj la celo estas la sama Okcidente kaj Oriente. Kiel komenci?

La unua paŝo estas: redakti nian Finan Akton, la Kontrakton de Eŭropaj Esperantistoj aŭ la Akton de Reciproka Kunlaborado de Eŭropaj Esperantistoj. Por tio necesas po kvin personoj el la landoj de EK kaj KEI, kiuj kapablas redakti la Kontrakton.

Kion ĝi enhavu? La bazajn principojn laŭ kiuj la Eŭropaj esperantistoj kunlaboros. Ekzemple: libroeldonado, librointerŝanĝo, kulturaj aranĝaĵoj, komuna revuo(?), renkontiĝoj, konferencoj, kongresoj, fondo de Esperantaj centroj (kultura, instrua, eldona, informa, radiofonia ktp.) reciproka informado pri la agadoj, komunaj kampanjoj samtempe en ĉiuj landoj, kiel informi la kompetentajn registarajn instancojn pri ĉiuj gravaj komunaj eventoj, kontaktoj kun la amaskomunikiloj, eldono de komunaj priesperantaj informiloj, aranĝo de ekspozicioj, turismo ktp. La Kontrakto en suplemento enhavu la du UNESKO-Rezolucioj, tiun de Manila pri la turismo per Esperanto, kaj opiniojn de famaj Eŭropaj politikistoj, verkistoj, sciencistoj, lingvistoj... pri Esperanto.

Tre grave! La Kontrakton ĉiu lando tradukas en sia(j)n lingvo(j)n, kaj dissendas ĝin al la amaskomunikiloj, gravaj registaraj instancoj, kulturaj, sciencaj institutoj, organizaĵoj, universitatoj...

* * *

Kiu faris la unuan paŝon, tiu devas fari ankaŭ la duan. Kaj tio estus ia kunlabora organizaĵo de la Eŭropaj esperantistoj. Tute ne temas pri iaspeca konstanta Eŭropa Esperanto-Asocio. Plie pri ia Eŭropa Esperantista Parlamento (EEP), kiu similus al la Asambleo de UN. Kiam ĝi kunsidos kaj kie, ĉu ĉiam en la sama urbo, aŭ ĉiujare en iu alia, nun estas flankaĵo. La esenco estas, ke ĉiu lando havas la rajton sendi du-tri deputitojn, reprezentantojn, delegitojn — la nomo nun same ne gravas —, kiujn elektas aŭ la gvidantoj de la landaj asocioj aŭ la asocianoj. Speciala komisiono ellaboras la Regularon de EEP. Niaj juristoj estas kompetentaj trovi la ĝustan juran formon.

EEP faras proponojn, kiel realigi la punktojn de la Kontrakto, decidas pri la jara komuna plano, akordigas la aranĝojn, diskutas novajn proponojn ktp.

* * *

Laŭ ĉi tiu plano, propono faros ĉion la esperantistoj, kaj ne de la neesperantistoj ili atendas la frititan kolombon.

Eble mi eraras, sed mi ne kredas, ke pri tia agado de la Eŭropaj esperantistoj, la kompetentuloj, antaŭ ĉio la amaskomunikiloj, restus indiferentaj, prisilentus la tutan aferon, neniu finlegus la Kontrakton, ne volus konvinkiĝi pri nia agado, sesioj de EEP, kie la ĉeestantoj de tridek tri Eŭropaj landoj debutas en Esperanto kaj ili sen interpretistoj komprenas unu la alian. Ja temas ne pri unusemajna kunestado ie, en iu Eŭropa urbo, sed pri tutjara kunlaborado. Kaj ĉion ĉi eblas efektivigi nur en Eŭropo, nur sur nia kontinento pro la kaŭzoj jam diritaj ĉi—artiko--artikole. Kaj kion signifus la funkciado de ĉi tiu plano por la evoluo de Esperanto ankaŭ ekster Eŭropo, tion mi konfidas al ĉies fantazio.

Jes, jes, sed... Ĉu post cent jaroj Esperanto jam maturiĝis, ke ĝi elpaŝu el la kluba horizonto kaj rigardu sian ekziston de sur pli alta perspektivo? Jes, ĉar Esperanto estas vivanta lingvo. Kaj ni ne forgesu, ke al nia laboro la veraj amikoj de Esperanto certe donos helpon, subtenon.

Post kelkaj jaroj formiĝus en Eŭropo „nova, vivanta lingva komunumo", la Eŭropa Esperantista Komunumo, kies membroj parolas la saman lingvon, kvankam ili vivas diaspore en ĉiuj Eŭropaj landoj, sed kunligas ilin la komuna lingvo, la komuna kulturo (literaturo) aj la komuna celo. La aparteno al ĉi tiu lingva komunumo estus pli altira, ol hodiaŭ iu klubo, grupo, kiuj kompreneble restos ankaŭ estonte la bazoj de la movado, sed ili vivos Eŭropan vivon per sennombraj kontaktoj, interrilatoj. Kaj kial ne havi„Membrokarton" pri la aparteno al ĉi tiu Komunumo?

Post kvin jaroj la Eŭropa Esperantista Komunumo jam certe tiom fortikiĝus, ke la Asembleo aŭ la Parlamento povus meti proponon al iu aŭ iuj Eŭropaj instancoj pri la uzo de Esperanto, kie kreiĝis la eblo.

* * *

Kelkaj citaĵoj eble estos pli konvinkaj, ol miaj vortoj.

En letero de 1925, Lanti, la fondinto de SAT skribis jene: *„La finfina oficialigo de Internacia Lingvo okazos, kiam sufiĉe vasta publiko jam utiligas ĝin de kelka tempo. Ĉiu alia espero estas iluzio. Aproboj de famuloj kaj institucioj valoras nur kiel reklamiloj!"* (L'Esperanto, 11/1977, Romo). La forpasintaj sesdek jaroj pravigis lin.

Jen pensoj por ni el la parolado de Franz Jonas en la UK de 1970 en Vieno.

„...mi avertas vin. Ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la Esperanto-movado estos forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon." Kaj li diris ankaŭ tion: *„Mi en tiu rilato mem faris multe da spertoj."* Vortoj de kompetentulo.

La malsukceso de la peticio transdonita al UN en 1966 estas konata. Jen, kion skribis d-ro A. Baur en sia artikolo „De la utopio al la realeco":

„La antaŭaj esperoj, ke mondlingvo povas esti akceptigata de supre, forflugis. La Esperanto-organizaĵoj venis al la rezulto, ke la premo devas veni de malsupre..."

Kaj fine, kion diris Zamenhof en Vaŝingtono en 1910:

„La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj: aŭ per la laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredeble nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia

afero, kiel la nia, la registaroj venos kun sia sankcio kaj helpo ordinare nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta."

Ĉi tiuj kvar citaĵoj por reale pensantoj sufiĉas, kvankam alies opinio neniel estas deviga por kiu ajn.

Povas okazi unu sola escepto: se iu granda ŝtato oficiale proponos la akcepton de Esperanto kiel komuna lingvo. Mi pensas pri Ĉinio. Ne necesas longa kaprompo, kial ĝuste Ĉinio? Sed mi ripetas: escepto, kaj ankaŭ ĉi-kaze ne la neesperantistoj decidos, sed la kompetentaj esperantistoj — eble anoj de la registaro — kaj la amikoj, la sinceraj simpatiantoj de la lingvo. Ke malgrandaj ŝtatoj faros proponon pri la konkreta utiligo de Esperanto, tio ŝajnas ne reala. Ili timas la fiaskon. Kial? Bonvolu denove legi la citaĵojn.

* * *

La planon, proponon kompreneble eblas poluri, aldoni al ĝi novajn pensojn, ideojn, pridiskuti ĝin en la gazetaro aŭ prisilenti, ne okupiĝi pri ĝi, forĵeti ĝin aŭ tutsimple nomi ĝin sonĝo, revo. Tamen, ĉu Esperanto antaŭ cent jaroj ne estis nur la espero de ĝia iniciatoro? La espero tamen fariĝis vivanta lingvo jam delonge, sed kie troviĝas tiu konstanta loko, kie „sufiĉe vasta publiko jam utiligas ĝin de kelka tempo"?

Pluaj argumentoj estas superfluaj. Nuntempe oni parolas pri la Spirito de Helsinki. Sole de la Eŭropaj esperantistoj dependas, ke post jaroj oni parolu ankaŭ pri la Spirito de Esperanto en Eŭropo.

Kiu silentas, pri tiu oni scias nenion, tiu simple ne ekzistas.



SIOTOUR BALATON IDEGENFORGALMI HIVATAL

VIAN FERION ĈE SIOTOUR!

En la banejurbo *Siófok* ĉe bordo de Lago Balaton, la Ferio- kaj Sportcentro de Siotour dum la tuta jaro prezentas la la gastoj variajn programojn kulturajn kaj sportajn.

En la klubejo troviĝas keglejo, biercjo, ludaŭtomatoj, videoinstalaĵoj, gimnastikejo (kun specialaj aparatoj), saŭno, sunlum-verŝilo;

en la ĝardeno tenis- kaj minigolf-ludejoj atendas la gastojn.

Adreso: Szabadidő Klub,
H-8600, Siófok, Beszédes J. aleo 3.
Tel: 11-645, 11-646

SZĀNTŌDPUSZTA

En Szántódpuszta somere programoj kun ĉevaloj, rajdado, ekspozicioj de hundoj, folkloraj artaĵoj, Balatona akvario, art-ekspozicioj prezentas multe da ĝuo.

Adreso: H-8622 Szántódpuszta, I. K. K.
Tel.: 31-014, 31-247
Telekso: 22-7381

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

Interlinguistica Tartuensis

Tiun latinan titolon havas serio da sciencaj eldonaĵoj de la Tartua Ŝtata Universitato. En tiu ĉi kultura centro de Estona Soveta Socialisma Respubliko daŭre oni esploras krom ugro-finnaj, slavaj kaj aliaj etnaj lingvoj ankaŭ interlingvistikon.

La unua kajero havis la titolon: „Aktualaj problemoj de moderna interlingvistiko". Inter la presejaj indikoj legeblas, ke ĝi aperas en diversaj lingvoj kun resumoj en diversaj lingvoj. Lastatempe trafis nian redakcion la dua kajero, ruslingva, kun Esperantaj resumoj, respektive kelkaj inverse. „Teorio kaj historio de internacia lingvo" estas la titolo de tiu ĉi kolektaĵo de studoj, kies respondeca redaktoro (ankaŭ aŭtoro de du eseoj) estas profesoro Duličenko.

La plejparto de la aŭtoroj apartenas al la elito en sia fako: Ariste kaj Duličenko profesoras en la Tartua, Kornilov en la Donecka, Skupas en la Vilnjusa universitatoj; Kopylenko kunlaboras al la kazaña, Kuznetsov al la Moskva lingvoscienca institutoj.

Kelkaj titoloj: „Aposterioraj lingvoj kaj tipologio de lingvokreado" (Kornilov); „La principoj de la teoria priskribo de planlingvo (Kuznetsov); „Pri emfazaj rimedoj de Esperanto" (Kopylenko); „Liva poezio en Esperanto" (Ariste). La plej ampleksa studo venas el la plumo de Duličenko: „La koncepto de la internacia kaj tutmonda lingvo ĉe E. K. Drezen (Unu fragmento el historio de la antaŭmilita soveta interlingvistiko.)"

La studoj verkiĝis ne por esperantistoj de klubkunvenoj, sed nepre mi rekomendas ilin al ĉiu lingvisto, verkisto, kiu en supera grado studas kaj kultivas nian lingvon.

Al la redaktoraro kaj al la kunlaborantoj ni deziras pluajn sukcesojn en ilia scienca laboro.

Márton FEJES

Rakonto pri heroa esperantisto

Jantaj Kavalov: La Rodopa Falko. Tradukis: Ivan Kovaĉev. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1984. 21 cm, 48 p.

Tiu ĉi broŝurforma libreto estas dediĉita al kolonelo Diĉo Petrov, kiu dum la dua mondmilito transiris kun sia reĝa bulgara soldataro al la partizanoj, kaj batalis kontraŭ la Hitleraj faŝistoj. Petrov estis esperantisto kaj falis kiel komandanto de la 1a soldata liber-bataliono „Ĥristo Botev" la 23an de majo 1944, apenaŭ 25 jara.

Tiom pri la heroo de la libreto „La Rodopa Falko". La lingvaĵo de la tradukinto bonas, ĝenas nur kelke da malkorektaĵoj, plejparte enirintaj el la gepatra lingvo de la tradukinto. Ekzemple, li ne unuece tradukis datojn. „La 3-an de oktobro 1940 jaro..." kaj „En la fino de aŭgusto 1940 j. ..." estas neeblaĵoj. Same Hitler ne elparoleblas kiel „Ĥitler". Tio, ŝajne, estas bulgarismoj, nepre evitindaj en internacia lingvo — kvankam nur malgravaĵoj!

Pli ĝenas la tipografio! Ŝajnas, ke la kompostejo de BEA ne disponas pri kelkaj Esperantaj literoj. Tial iu (kompatinda) homo turmentiĝis aldoni mane ĉiujn mankintajn supersignojn. Kompreneble tiu helprimedo iomete primitivigas la grafikan aspekton. Kaj ĉi tiu entute ne estas zorgeme pritraktita: linioj kurbiĝas, estas tie interliniaj spacoj, kie ili estas tute superfluaj, korektitaj vortoj estas ne ekzakte muntitaj kaj „dancas" ekster la liniaj vicoj. Libroamikon tio certe nur ĝenas, sed la okuloj de tipografo estas forte ofenditaj! Homo kiel Diĉo Petrov meritus pli da zorgemo ankaŭ koncerne la tipografion.

Krome mi deziras, ke la aŭtoro aŭ la eldonejo estus aldonintaj kelkajn klarigojn por tiuj legantoj, kiuj ne bone konas la bulgaran historion kaj personojn kiel Rakovski, Botev, Karaĝa ktp. Fremdlandanoj tiel pli facile penetrus la interesan rakonton pri la heroa esperantisto, povus pli bone kompreni la ŝanĝiĝon de la iama subleŭtenanto de la reĝa bulgara armeo al estro de gerila taĉmento. Sed tia informa fono mankas.

Joachim Schulze

Birdo, ne restu soleca!

La Feliĉa Birdo. Rakontoj. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 18 cm, 50 p. Prezo por Hungario:25,- forintoj.

Ĉina Esperanto-Eldonejo surmerkatigadas tutan serion da ĉinaj popolaj rakontoj. Laŭenhave ankaŭ „La Feliĉa Birdo" estas tiaspeca. Aliaj libroj de tiu serio titoliĝas „Rakontoj pri Afanti", „Saĝo-Sako" kaj „Magia Ŝipo". Per tiuj malgrandaj kaj nur malmultajn paĝojn ampleksantaj libretoj la leganto konatiĝas kun la abunda kaj multnacia rakontaro de la multnacia popolo de Ĉinio — aplaŭdinda entreprenado de la eldonistoj!

„La Feliĉa Birdo" prezentas tri legendojn per facilega lingvo. Tial ĉi tiu libro certe bone taŭgas kiel postkursa legaĵo. Nur malofte oni trafas peketojn lingvajn — ili ne gravas kaj ne dolorigas, ili pardoneblas.

Kiel jam la aliaj ĉi-supre menciitaj libroj, tiel ankaŭ la tri Tibetaj rakontoj de „La Feliĉa Birdo" ensorĉas la leganton, kondukas lin en la misteran mondon de feinoj, magiistoj kaj bonkoraj simpluloj. Laste, almenaŭ pleje, la malfeliĉo estas venkita. per superhomaj faroj — nu, temas ja pri legendoj! Tamen ne nepre pri porinfanaj! Oni, do, konsilu al la ĉinaj eldonistoj daŭrigi tiun komencitan serion per aldono de pluaj libretoj, enhavontaj popolajn rakontojn el la granda naciaro de Ĉinio, kaj per tio krei kompletan kolekteblan rakontaron.

Precipe, kaj kontraŭe al iuj aliaj libroj de tiu ĉi libroserio, mi substreku la vere sukcesan tradukon de „La Feliĉa Birdo" — ĝi estas simpla, tamen altnivela. Tial ĝi estu la mezurilo por sekvontaj libroj samkarakteraj. Libroj ja klerigu la legantojn perenhave kaj perlingve. Feliĉe estus, se „La Feliĉa Birdo" ne restus unu el la „solecaj birdoj" inter la ĉina „birdaro" — do, inter la jam nun ekscite atendataj novaj libroj samnivelaj.

Joachim Schulze

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

Vido malantaŭ „kulisojn"

Bukedo al vi. Noveletoj. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 18 cm, 96 p. Prezo por Hungario: 35,- forintoj.

„En la lastaj jaroj, en la literatura ĝardeno de Ĉinio disvolviĝas tufo da malgrandaj floroj delikate kaj freŝige aromantaj kaj estas ŝatataj de pli kaj pli da homoj. Oni nomas ilin ‚noveletoj' aŭ ‚mikronoveloj'", klarigas la eldonistoj en la antaŭparolo de tiu ĉi libro. Temas pri ĉiutagaĵoj, mallongaforme kaj epizode rakontantaj pri ajna okazintaĵo. En „Bukedo al vi" priskribas 24 tiaspecaj noveletoj tre bone la vivon en la plej multnombre loĝata lando de la mondo. Per tio la legantoj povas vidi „malantaŭ la kulisojn" kaj penetri en la plej diversajn problemojn de la nuna Ĉinio, en la deziroj, esperojn kaj pensojn de la ĉina popolo. Kiel leganto oni ricevas instruhorojn, sen rimarki tion, pri la vivo en la fora Ĉinio. Tial la libro estas salutinda.

Do, kie estas lumo, tie ankaŭ regas ombro. Ne kontentigas la titollinio de la libro. Ĝi konsistas el citaĵo el la samtitola noveleto pri sportistino, iu kutime gajnas ĉampionadojn internaciajn, sed ĉi-foje ŝi malsukcesis. Ŝi tre malĝojas pri tio, kaj ne atendas aplaŭdon de siaj adorantoj. Sed stevardino de iu flugkompanio transdonas al la malĝojulino florbukedon. „Jen bukedo al vi!", diras la stevardino sur paĝo 10. Mi dirus „Jen bukedo POR vi!". Oni povus kontraŭdiri al mi, ke mi estas pedanta. Tiam mi respondus: Ĉiu verkisto esperantista transprenas grandan respondecon per publikigado de siaj linioj. Li/ŝi ne povas permesi al si eraron, ĉar la vasta legantaro povus imiti ĝin. Tial ni devas esti severaj, ankaŭ ĉi-kaze!

Joachim Sculze

Meritus pli bonan lingvaĵon

Magia ŝipo. Popolaj rakontoj. Eldonis: Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. 18 cm, 75 p. Prezo por Hungario: 35,- forintoj.

Ĉiam scivole mi pririgardadas Esperantajn librojn el la ĉina eldonejo, ĉar mi konstatis, ke la tieaj eldonistoj vere profesie laboras. Tio validas kaj por la grafika aspekto de la libroj, kaj por ties lingvaĵo. Mia unua konstato certe, ja nepre, rilatas al la libro „Magia ŝipo". Multkolora kovrilo, bonaj ĉineskaj ilustraĵoj, arta tipografio. Nenio riproĉinda!

Iom mi hezitas pri la lingvaĵo de la recenzata libro. Parte bone tradukitaj ĉinaj popolaj rakontoj, per kiuj la eldonejo volas diskonigi fragmenton de la skriba historio (preskaŭ 4000 jara!) de la Han-nacio. Tiu ĉi nacio ja havas pli ol 930 milionojn da anoj kaj estas per tio la plej granda nacio en la mondo! Sufiĉa kaŭzo por publici tiajn rakontaĵojn en Esperanto. Sed — ili meritus pli bonan lingvaĵon, sincere dirite! Ekzemplon? Mi donas, jen: sur p. 7 legeblas: „Reprenu vian originalan formon', do ĝi denove fariĝos paperŝipon malgrandan kiel la antaŭa." La apostrofon fine de la vorto „formon„ mi kalkulas apartenanta al la „sekcio de presdiablaĵoj" — sed la superfluan, ja tute malkorektan akuzativon mi ne povas pardoni!

Ankaŭ ne tiajn vortkonstrukciojn kiel „brullignohakisto" aŭ „portseĝo"[1] (ĉu seĝo de porto?) aŭ eĉ la monstraĵon „gren-, brullign-, koton-, ŝtof-vendantoj". Tiaj enigmaĵoj ne kaŭzis apetiton tralegi la libreton, tamen la interesa enhavo min devigis!

Spite al mia akra kritiko: la libro rekomendindas por tiuj legantoj, kiuj volas penetri la ĉinan pensadon kaj konatiĝi iomete kun ĉinaj legendoj kaj mitoj. Tiurilate la libro certe malfermas novajn enrigardojn.

Joachim Schulze

[1] „Portseĝo" tamen troviĝas en PIV kun la signifo, kiun atribuis al ĝi la ĉina tradukinto. (Noto de la Redakcio.)

Bona enkonduka verko

Margrete Landmark: Infanpsikologio. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1978. 10+188 p. 30 cm.

La verko, pri kies apero la revuo „Esperanto" informis en la jaro 1982, estas pliampleksigita kursoteksto, uzita en la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo en 1978.

Gravaj kaj trafaj estas la enkondukaj frazoj: „La homa infano evoluas de si mem, kiel la tulipo, kiel la mevo. Sed neniu kaj nenio evoluas en vakuo. La evoluprocezo karakteriziĝas de daŭra interagado inter organismo kaj medio, senrigarde, ĉu temas pri kresko de plantoj, ĉu de bestoj, ĉu de homoj."

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

La unuaj tri ĉapitroj (La hereda bazo; La komenco de persona vivo; La infano: socia kunulo) sekvas laŭtempe la evoluon de la malgranda infano. La leganto estas arte instruata pri kromosomoj, aŭtomosoj kaj sekskromosomoj, pri dominantaj kaj recesivaj ecoj, pri interagado de heredo kaj medio. Vekos ĉies intereson la klara ekzemplo de evolucio surbaze de heredo kaj selektiĝo: kiom fortan aŭ malfortan kolon havas beboj en diversaj etnaj grupoj, depende de la maniero portadi ilin. Kun timo kaj espero oni legas pri la plej riska hereda faktoro, nomata genmutacio.

Margrete Landmark en la verko instruas iom da biologio kaj pli da psikologio; sed dume ŝi nek povas, nek volas eviti okazojn por priskribi la socian praktikon, kiu jen multe, jen apenaŭ influas la disvolviĝon de la infana vivo kaj evoluo. Ĉe tio ŝi stillerte uzas kontrastojn, surprizas per lakonaj frazoj kun grava mesaĝo. Legu alineon el la subĉapitro „La nasko": „Kelkaj virinoj iras al la hospitalo por naski infanon. Kelkfoje la patro povas ĉeesti en la hospitalo dum la naskiĝo, kelkfoje ne. Kelkaj virinoj naskas hejme en sia propra lito kun la helpo de najbaroj, parencoj, la patro aŭ profesia akuŝistino. Pri kelkaj gentoj oni raportis, ke la virino iras sola en arbaron kaj naskas sian infanon sen helpo de alia persono, kaj revenas al la hejmo kun la novnaskita infano. KELKFOJE ŜI NE REVENAS."

En la tria ĉapitro multon oni ekscias pri la komunikiĝo de la bebo kun la plej grava persono, kun la unua vartanto de la infano. (Tiun personon la aŭtorino nomas patrinanto; plej ofte la patrinanto estas la patrino.) Kelkajn tagojn post la naskiĝo la bebo povas turni sin en la direkton, de kie ĝi aŭdas sian nomon; sed nur, se vokas la patrinanto. Ankaŭ ni, laikoj, kun vigla kompreno kaj kun personaj rememoroj legas pri la specoj de kriplorado, pri la evoluo de ridetado. gepatrojn eble kortuŝas, ke bebo unumonata rimarkeble imitas vizaĝesprimojn de siaj „proksimuloj". — Oni trovas en la libro interesajn rimarkojn pri la lingva evoluo de la infano, kaj pozitivan takson de plurlingva edukado „sub bonaj kondiĉoj por lingva progreso".

La kvara (Infanoj, gepatroj kaj socio) estas la plej mobiliza ĉapitro de la libro. „En 1948 la Socia Komisiono de Unuiĝintaj Nacioj decidis ke oni faru studon pri la bezonoj de senhejmaj infanoj" — diras la aŭtorino, kaj poste ŝi sekvas la posthistorion de tiu decido. Oni povas legi pri la kvalitoj kaj funkciad-maniero de diverstipaj infanhejmoj, institucioj, fostrohejmoj (t.e. ordinaraj hejmoj, kie oni edukas ne-propran infanon sen adopti ĝin). Oni ĝustatempe ekkonas la gravecon kaj pli profundan enhavon de la nocio „atașo" (socia kunligo inter infano kaj patrinanto). La aŭtorino citas opinion de John Bowlby (Ĝon Boŭlbi): „Eĉ tre netaŭga patrino — el la vidpunkto de la mondo — estas por la evoluo de la infano multe pli dezirinda ol neniu patrino. — Kun plezuro, ni, hungaroj, povas legi la kontent-esprimajn alineojn pri la ekzemplodona kaj sukcesa laboro en la Budapeŝta infanhejmo Lóczy (lo:ci), pri la atingoj de Emmi Pikler kaj ŝiaj koleginoj. La aŭtorino substrekas la eblon de la infanoj evoluigi atașon al UNU CERTA vartistino.

La celo de la sekvaj tri ĉapitroj estas: formi laŭeble ekzaktajn psikologiajn nociojn ĉe la leganto; karakterizi la idearon de la psikologio en historia perspektivo. Margrete Landmark, konstatinta en la enkonduko, ke la psikologiaj pensosistemoj estas en antaŭstadio de scienca ekzakteco, nun prezentas la labormetodojn de la psikologoj: kiel ili akiras materialon, kiel ili starigas siajn esplorcelojn, kio estas longitudaj esploroj kaj esploroj transversaj. La sesa ĉapitro klare kaj sufiĉe detale prezentas la psikanalizon: tiun de Freud (frojd) kaj la postan evoluon; la sesa ĉapitro konigas la epistemologion de Piaget (piaĵe). La lastaj du ĉapitroj traktas ludadon — tra generacioj, landoj, kulturoj.

Verŝajne estas mia devo mencii pri la okulfrapa neologismo „ zi". Ĝi estas persona pronomo singulara, triapersona, komuna al ambaŭ seksoj: „li" aŭ „ŝi". En la verko plej ofte ĝi rolas por resendi al la substantivo „infano". Krom diri, ke ĝi ne estas Fundamenta, mi opinias, ke ĝi estas iom tro proksima al „si", krome ĝi povas kaŭzi aŭ pliverŝajnigi malfortan fonetikan pozicion ĉe renkontiĝoj kun verbo-finitivoj. (Ekzamenu la opozicion „batis zin" : „batis sin"! La propono cetere apartenas al Jonathan Pool, kiu uzis ĉi tiun pronomon en ISU-prelego en Ateno, 1976.)

o

Resume mi asertas, ke la proponata verko estas enkonduko tre klera, honesta, kaj mi diru, ama. Ĝi sentigas komprenon kaj amon al la leganto, kaj amon al la psikohava infano, pri kiu ĝi temas. Leginte la unuajn ĉapitrojn, mi demandis min: kial, antaŭ dekkelk jarorj, devante studeti psikologion, ne eblis al mi legi ĉi tiun verkon? Eble mi sukcesus ĉe la ekzameno pli eminente; kaj certe mia kontakto kun la evoluanta psikologio estus seninterrompa.

Balázs Wacha

Sur estona bieno

Mats Traat: Danco ĉirkaŭ lokomobilo. Romano. El la estona tradukis: Hillar Saha kaj Henrik Seppik. Eldonis „Eesti Raamat", Tallinn, 1984. 17 cm, 176 p. Prezo: 9,60 ned. gld. (Por Hungario 15,- forintoj.)

La lokomobilo de la titolo de ĉi tiu tre leginda romano troviĝas sur estona bieno dum la tuta periodo de la rakonto, sed la temo ne estas nur la historio de la maŝino mem. Homoj estas pli interesaj kaj gravaj ol maŝinoj kaj la romano pentras por ni ankaŭ la vivojn de la homoj, kiuj uzis la lokomobilon por funkciigi draŝmaŝinon por sia grenom.

Ni ekkonas inter 1914 kaj 1957 tri generaciojn de familio sur unu bieno kaj tri generaciojn de la maŝinistoj, kiuj funkciigas la lokomobilon. Ni ekkonas ankaŭ kelkajn el iliaj najbaroj. Temas pri burĝoj, ne kulakoj, kaj pri iliaj rilatoj, sociaj kaj amoraj, kun la malpli riĉaj homoj, kiuj laboras por ili.

La praavoj de mia edzino estis kamplaboristoj, kaj mia avo kaj liaj praavoj estis bienuloj. Mi do legis ĉi tiun romanon kun kreskanta interesiĝo kaj simpatio. Malgraŭ la granda distanco inter Estonio kaj la angla bieno, kie mia patro naskiĝis, la cirkonstancoj kaj okazaĵoj similis. Du mondmilitoj kaj la alveno de maŝinoj kaj novaj formoj de demokratio ŝanĝis la medion en ambaŭ landoj.

Sed Estonio devis suferi invadojn de naciistoj kaj faŝistoj kaj la punoj eĉ por milda kontraŭstaro estis drakone severaj. Certe emocios ĉiun leganton la priskribo de serĉo por senofenda cigano kaj lia provizora saviĝo.

La teksto estas ĝenerale facile komprenebla, kvankam de tempo al tempo frazoj kiel „La lokomobilo restigas sur la sabla, post la pasintvespera torenta pluvo malseka vojo belan desegnaĵon... " povus esti pli klare esprimitaj.

recenzoj recenzoj recenzoj recenzoj

Al la „Dio" de la kristanoj kaj la Fundamento mankas tra la tuta libro majusklo. Estas tamen utile konservi distingon inter „Dio" kaj aliaj dioj.

Propraj nomoj de homoj kaj vilaĝoj konservas sian estonan ortografion. La ŝajne simplaj reguloj de ilia prononcado estas klarigitaj post la verko.

Postparolo de August Eelmäe, kiun la leganto devus legi antaŭ ol li komencas la libron, diras, ke la romano elkreskis el filmscenaro kaj konsistas el kvin aktoj 1914, 1929, 1943, 1949 kaj 1957. La romano estis eldonita estonlingve en 1971.

Edward OCKEY

Poeto proksima al ĉiu

Zora Heide: Spuroj de l' doloro. Poemaro. Eldonis: Författares Bokmaskin, Stockholm, 1984. 21 cm, 103 p.

Estas poetoj konataj, eĉ famaj, kies poezio tamen ne varmigas. Zora Heide apartenas al alia speco: eble, ŝi ne estas granda poeto, sed pliparton de ŝiaj versaĵoj, verŝajne, legos kun plezuro eĉ tiuj, kiuj ne estas ŝatantoj de poezio.

Zora Heide senbrue eniris la Esperantan literaturon, eldoninte librojn de diversaj ĝenroj: poezio, prozo, teatraĵetoj. La prezentata poemaro atestas pri ŝia matureco.

La libro konsistas el sep ĉapitroj: La soleco de l' amo, Sopiro, Mistero de l' vivo, Ni estas nur homoj, Norda printempo, Vizio, Miniaturoj. La karakterizaj trajtoj de la poetino estas profunda lirikeco kaj, mi dirus, „kosmeco" majstra posedo de la intonacia ritmo. Ŝia ĉefa temo estas amo, ne nur feliĉa, sed pli ofte malfeliĉa, kiu alportas doloron. Ŝi meditas ankaŭ pri la senco de la vivo, pri pli bona futuro de la homaro kaj ne evitas la gravajn problemojn de paco kaj milito, neniam falante en la marĉon de malsincera deklarismo. Fojfoje ŝia poezio leviĝas ĝis patosa epopeeco, kiel en la bonega versaĵo „Ni estas homoj". Ŝiaj miniaturoj estas plaĉaj, kvankam, eble, iomete afektaj.

Fine, estas agrable rimarkigi, ke la libro okupus indan lokon eĉ en la biblioteko de persono, kiu kolektas librojn nur laŭ ilia bela ekstera aspekto.

Kaj ankoraŭ mi volas atentigi, ke lastatempe oni tro vaste uzas la vorton „poemo", aplikante ĝin al ajna versverko. Ekzemple, mia lango ne turniĝus por nomi poemo kvarlinian versaĵon.

Boris KOLKER



En la lingvo de ŝia patro

Henryk Sienkiewicz: Noveloj. El la pola tradukis Lidia Zamenhof. Eldonis: Eldonkleriga Centro Ritmo, Varsovio, 1985. 68 p., 18 cm. Prezo por Hungario: 25,- forintoj.

Doktoro Zamenhof ne devigis al siaj infanoj, ke ili lernu Esperanton. Ili neestis denaskaj esperantistoj. El ili nur lia filino Lidia fariĝis treege fervora esperantisto.

Ial la verkoj de Henryk Sienkiewicz, Nobelpremiito, entuziasmigis ŝin. Ŝi tradukis ne nur lian plej konatan romanon „Quo vadis?", sed ankaŭ plurajn el liaj noveloj, el kiuj kvin aperis en Lepsiko (Leipzig) en 1925.

Nun nova eldono de la novelaro redonas al ni faksimilan kopion de la eldono de 1925 kun ĉiu detalo, eĉ la originalaj paĝonumeroj.

Du el la noveloj temas pri fidela lojaleco, jen de funebra skulptisto al sia edzino jam dudek jarojn mortinta, jen de servutulo al la familio de sia mastro-sinjoro. Du estas legendoj greka kaj hinda, jen pri viro blindigita pro ekvido de la vero, jen pri lotuso en homa formo. En la lasta novelo orfino, kredante ke venas al ŝi anĝelo, vidas lupon.

Freŝdata enkonduko de Andrzej Pettyn aldonas al la biografio de Sienkiewicz en la originalo pliajn interesajn informojn, i.a. pri tradukoj de liaj verkoj, kiuj aperis en Esperanto.

Lidia Zamenhof verŝajne lernis Esperanton aŭtodidakte kvankam ŝia patro certe helpis ŝian studadon. Ŝia traduko estas preskaŭ ĉiam klasike pura.

Edward OCKEY

GAJA PAĜO

FERIE FERIFERIE

Oĉjo Tonĉjo, ferianta muzikisto, aŭdinte helpkriojn, kuris al la lagbordo, kie li rimarkis kuŝantan ulon.

— Feliĉe, ke vi aŭdis mian krion! Do vi helpos min, ĉu ne?

— Ne, ne! Mi venis sole por laŭdi vian grandiozan tenorvoĉon!

AMA LISTO?

— En via aĝo, kara onklo, vi havas certe belajn memorojn pri la virinoj, ĉu?

— Kompreneble! Ho, rememori pri la belegaj virinoj, pri tiuj multaj diablinoj, kiuj ĉiuj siatempe — rifuzis min!

AMA ARO?

— Aŭskultu, en tiu ĉi parko ĉie ajn ĉirpadas la griloj! Kiel romantike, ĉu ne? — parolas knabino.

— Romantike interkisadas la paroj sur la benkoj, mi vidas. Sed ne eraru, karulinjo! — respondas junulo. — Ne grilojn vi aŭdas ĉirpadi, sed... zipfermilojn.

PSIKA PROVO

— Sinjoro! — sonas de psikiatro — imagu, ke post dancado oni vin enfermas en ĉambron. En ĝi videblas unu bela knabino, kaj sur tablo unu botelo da konjako. Nenio alia! Mia demando: al kio vi kaptos plej unue?

— Plej unue mi tuŝos la lampoŝaltilon, doktoro.

SAGA HUNDO

— Mi sendis al la strato mian saĝan hundon por la Vespera Gazeto.

— Sed ĝi revenis sen gazeto! Kie do ĝia saĝo?

— Tion vi ne komprenas. Oni volis trompi ĝin per hieraŭa ekzemplero!

KAPOGRATO DE BUROKRATO

— Niaj ŝrankoj jam plenas de paperaĵoj... — meditas la kontorestro. — Iom ni devos jam likvidi el ili.

— Eble la malnovajn leterkopiojn, ĉefo! — konsilas iu.

— Grandioza ideo! Sed ne forgesu fari kopiojn pri ili!

KAJ LIAJ VESPEROJ...

— Mi aŭdis, ĉefo, ke vi pasigas viajn vesperojn ĉe Marta. Sed kial vi ne edzinigas ŝin? — demandis alia kolego.

— Nu, ankaŭ mi pensis jam pri tio. Tamen mi rezignis, ĉar kie mi pasigos tiam miajn vesperojn?

TV-MATENOJ KAJ VESPEROJ

Estas dimanĉo, vesperiĝas. La edzo finfine elŝaltas la televidilon, oscedas (kompreneble li), etendas ĉiudirekten siajn membrojn (ne la anojn!), poste turnas sin al la edzino: — Ĉu vi diris ion al mi, karulinjo?

— Ho jes, karulo mia! Ankoraŭ matene mi humile kuraĝis diri al vi: Bonan matenon!

HEJ, AKTORO!

Du sinjoroj interparolas en la kinejo.

— Plaĉas al mi tiu dika aktoro, kiu ludas la patron.

— Jes, hodiaŭ ni estas bonŝancaj koncerne lin. Kredu al mi, hieraŭ li ludis tre malbone en tiu ĉi filmo...

HEJ, EDZO!

— Estas strange, jam depost jaro vi ripetadas, ke vi eksedziĝos. Kial do vi prokrastas tion?

— Pro nesolvebla kaŭzo. Mia edzino kaj mi ne interkonsentas, kiel dividi la tri infanojn. Do ni atendos, ĝis ili estos kvar!

REVUO DE REVUOJ

Kiom varia kaj bunta povas esti en Esperantujo la gazeta en-havaro! (Ne *havario* — s-ano kompostisto, atentu!) Sincere dirite, mi ne tre mirus, se li — diligenta leganto de la E-gazetaro — farus la supran eraron pro subkonsciaj motivoj. Kion fari? Antaŭvenas ja spertoj ne tro agrablaj... Sed kio kaŭzis ilin? Eble manko de lerte verkitaj kontribuaĵoj? Ĉu la ne-profesiaj, enuige tekstigantaj ne-profesiaj artikolantoj? Tamen pli probable — mi eĉ veti kuraĝas — la manko de necesa redaktora fantazio kulpis.

Jen, foliumu la sufiĉe ampleksan revuon LUMO (vintra) el la sufiĉe vasta Kanado. Ĝia brava redaktoro *Brian D. Kaneen* (ne demandu kiel prononci) ne hezitis kontaktigi sian revuon al KONTAKTO, el kiu (kaj kelkajn el aliaj E-gazetoj) li ĉerpis legi kaj diskonigi indajn artikolojn. Tiel produktiĝis pli interesa kaj agrabla numero, kun lingve facilaj artikoloj, kaj kun pluraj tiaj, kiuj alligas pli al la internacia movado la alikontinentajn — espereble kontentajn — legantojn.

Pri la varieco zorgis, inter aliaj, *Rüdiger Eichholz*, kies komputilaj metodoj detale klarigitaj certe altiros internacian atenton. Li demonstras kiel eblas tre avantaĝe registri kaj ordigi terminojn per komputilo, kaj aranĝi ampleksegan terminaron per liaj priskribitaj, lerte aplikataj metodoj.

Ĉu ŝajnas jam superflue en la E-movado argumenti pri la graveco de faka-teknika literaturo? Kvankam tiurilate la UK en Aŭgsburgo per aparta rezolucio esprimis emfaze kio estas bezonata, tamen aŭ tiom pli, estas ankoraŭ urĝe kaj forte movigenda tiu afero. Mi salutas do la alvokon, vere gravan de *Wera Dehler* pri vasta kunlaboro de ĉiaj fakuloj por terminologio, havanta „novan ŝancon" (DER ESPERANTIST, 1). La gravegan terminologian-normigan laboron devas necese partopreni fakuloj kun profunda scio pri sia fako — tio ŝajnas tre natura postulo —, sed nepre kun bona kono de pluraj lingvoj. Nur la gepatra kaj Eo neniel sufiĉas por tiaspeca normiga laboro, tion pruvis jam ne malmultaj ĝenaj maltrafaj vortelektoj en diversaj vortokolektoj. Oni povas prezenti sin ankaŭ al la sekretario *Iván Bujdosó* (ĉe la adreso de nia revuo).

Se jam paroli pri vortoj en terminaroj, oni devas atentigi vortaristojn kaj terminologojn (ne temas pri fakuloj de tero-minado!), kiuj ŝvite minadas el la vorto-aro val-orojn, ke ili evitu adori bigote vortarojn kiel idolojn! Ne sole pro tio, ke ankaŭ bonegaj vortaroj enhavas ne malmulte da eraroj kaj fuŝaĵoj. Eĉ niaj Universala Vortaro kaj PIV, kompreneble, ja homoj kompilis (eĉ kompostis) ilin. Rigardu en PIV: apud TRITIKO videblas signo aludanta al... „medicino"; eble la malplej grava erareto en ĝi. En MONATO (3.) utila diskuto almontris malutilajn sekvojn, se iu mekanike kribradas en vortaroj. Dum tio eblas ja foje neglekti la *verajn sencojn* de la vortoj. Kvazaŭ pro sentimentala inklino al la vortar-trezoro, esploristo, ne sufiĉe konanta tiun fremdan „arbaron", firme kredas pravaj la erarojn, kiuj devenas parte pro la vivanteco de la lingvo. Ankaŭ pro la kompleta maleblo envortarigi ĉiaspecajn dirmanierojn, la sencoŝanĝojn tra la tempoj. Oni devas *ĝuste uzi* vortarojn kaj konsultlibrojn — konkludis *Stefan Maul* — nepre atentante la aktualan uzatecon kaj ĉe la popolo, kaj ĉe la fakuloj, en la kazo se temas pri faka teksto.

Estas nura hazardo, se kaptante alian diskuton ni denove trafas inter termino-problemojn. Unuavice temas pri dezirindaj psikologiaj trajtoj de nia informado pri Eo, al kiuj bonege atentigis *Claude Piron* en ESPERANTO (12.). Manon sur la koron: kiom ofte ni informas eble laŭfakte, tamen psikologie malĝuste! Prave li eksplikis nian kronikan difekton, senplue paroli pri nia „internacia" lingvo, kiun — bedaŭrinde — multaj mallogike komprenas: „lingvo forigonta ĉiun nacian lingvon! Apud la trafaj konsiloj mi trovis kurioze, ke iuj konsideras la lingvon vivanta „estaĵo", anstataŭ la tutsimpla fakto: „produktaĵo" de la homaro, resp. de popolo, kiu estas same ŝanĝiĝ ^ema kiel ĝiaj „produktantoj", laŭ la konata latina diraĵo: „La tempoj ŝanĝiĝas kaj ni ŝanĝiĝas en ili." *(Tempora mutantur...)*.

Detlev Blanke havis diskutindan argumenton kontraŭ la ne-plaĉo de *Piron* koncerne la esprimon „planlingvo" (ESPERANTO, 3). Konsentite, ke mem la ideo de planado ne nepre devas ĝene resoni, se almenaŭ iom oni komprenas pri la evoluo de lingvoj ĝenerale. Ekzemple: iomete pri la lingvoĝustigoj de Akademioj ĉiulandaj. Aliflanke, uzi en naciaj lingvoj la ekvivalenton de planlingvo, dependas ankaŭ, ĉu la lingvo permesas por si tian kunmetaĵon aŭ kunigitan esprimon? Ne nepre, kiel tio eblas en la ege kunmetema germana lingvo. (La hungara lingvosento — nuntempe — neniel permesas tiusencan esprimon, ĝi devas kontentiĝi per „artefarita lingvo".) La planitecon oni devas do foje ekspliki kaj ne enpremi en la terminon.

Surpriziĝas kun troigita alta voĉo SENNACIULO (4.), ĉar oni jam ne invitas SAT kongresi venontjare en Pollando. Kial? Mi opinias, ke pro ilia rabia, krude malamika sinteno. Ajna registaro rifuzus inviti la ĝin kalumniantan organizon. Rigarde la E-movadon, mi (bedaŭrinde) certas, ke apud la jubileanta Kongreso de UEA, la minacaj voĉoj de SENNACIULO provokos skandalojn, tro malagrablajn por niaj pola kaj universala movadoj. Tian situacion volis eviti Pola Esperanto-Asocio, ĝi agis prudente, eĉ favore al la movado, kiu ne estas ludilo de malpacemuloj.

Ervin *Fenyvesi*

KORESPONDI DEZIRAS

Magistro-disertaĵon verkas studento pri la filozofiaj kaj religiaj opinioj de L. Zamenhof. Tiucele serĉas materialojn Andrzej B. LEWKOWICZ, prunte, ev. fotokopie, kostojn rekompencos. KATOWICE ul. Panewnicka 76, PL-40-760. — S-ro Rein SAGG deziras havi ĉiujn numerojn de HUNGARA VIVO, ekde fondiĝo. Petas s-anojn sendi al li la jam nebezonatajn HV-ekzemplerojn, volonte rekompencos! VILJANDI, p.k. 82. Estonio, SU-202.900.

Monika BOBKIEWICZ (26) kemiistino, freŝe edziniĝinta, instruanta E-on, kun junaj hungaraj geedzoj aŭ aliaj, pri hejmtaskoj, kuirado, naturprotekto, hung.-pola historio, rec. gastigado. OPOLE str. Rybacka 8-25. PL-43-005. — Minka STOJANOVA (20) instruistino pri muziko, profesio, libroj, sporto kun gejunuloj. AJTOS, str. Cudni skali 14, BG-8500. — F-ino Ursula JAWORSKA (25) pri turismo, literaturo, herba medicino. OSTRÓW-MAZ. str. Wyczókkowskiego 4, PL-07-300. — Instruistino Janina BAGVILLIENÉ (35) pĉt. VILNIUS, V: Putnos gt. 12a-81.

Lernanto Dmitrio ROJTMAN (14) ktm., pĉt. Str. Viljjamsa 66-37, ODESSA, SU-270104. — Lernanto Jevgenij MURIJ (14) ktm., pri sporto. Str. Izvestkorraja 75-7, ODESSA, SU-260006. — Alekseo GEĤT, lernanto (15) ktm., kol. pm. Str. Engeljsa 10-12, SU-270004. — Alla LITVINENKO (22) studentino ktm., pĉt. Str. Ak. Zabolotnogo, d. 21, kv. 27. ODESSA, SU-270069. — Ekonomikistino Tatjana IVANOVA (25) precipe kun hungaraj ges-anoj pri historio, literaturo, muziko k.a. AJTOS, str. 1911, n-ro 3-2, BG-8500. — Lernanto Ero LIIVIK (14) ŝatas lingvojn, kol. pm., pk. TALLINN, Koore 1B, Save I, Estonio, Su-200.902. — Piotr RUTA (14) pri sporto, turismo, mod.muziko, kol. pm., prospektoj, bildstrioj. ŜREM ul. Zawadskiego 12-20, PL-63-100. — Inĝ. Ludék CHMELA (33) precipe kun hungaroj perfektigi sian E-scion, ankaŭ pri mod. literaturo, foto, lingvoj k.a. PARDUBICE, Ke Tvrzi 1692, CS-530-03. — Filologino Olga KARNOVA (26) ktm. pri muziko, kanto, arto, literaturo, scias hispane, portugale. JEFREMOV ul. Slovatskogo vosstanija d. 4, kv. 50. SU-301.860. — Instruistino Danuté KOLESNIKOVA (40) kaj filino Daina (18) studentino de la franca, ktm., pĉt., interŝ. pm., bk., kol. fotojn (hundo, kato). ALYTUS Jaunimo 14-13, Litovio, SU-234.580.

Lingvostudento (21) kun gejunuloj el Mez-Eŭropo pri lingvo, tradukado, tradicioj kaj ĉiutagaĵoj laŭlandaj, k.a. Uwe WERNER, ZEITZ Steinsgraben 29, DDR-4900. — Judita JAKABOVÁ (17) studentino pri lingvoj (F, A, R) k.a., kol. pk. kun geamikoj. ARDOVO ĉ. 24, CS-04955. — Stanislav DEBSKI (21) pri literaturo, filozofio, foto, turismo k.a. ROZYCA str. Glowna 55, PL-97-122. — Bužokas KONSTANTINAS (41) nask. 1945 je la tago de A-bombo sur Hiroŝima, dez. trovi samaĝulojn, kol. bk. pri naturo kaj urboj. MAŽEIKAI Valiuno g. 9. Litovio, SU-235.500. — Klubo Juna Esperantisto (18-30) ktm., pĉt. RUSE p.k. 501, BG-7000. — Lingvoinstruistino Cecka VELIČKOVA (30) ankaŭ A, F, pri E-instruado k.a. PLOVDIV Saturn 12, BG-4002. — Jolanta FUDALA pri muziko k.a. kun geamikoj. KONSKIE str. 3-Majo 13m10, PL-26-200. — Sándor FÖLDVÁRI (22) kun junulinoj, pĉt. PÉCEL Gagarin tér 4c I.3. — Valerio VORONIN (33) fraŭulo, laboristo, pri vivmanieroj, pensadoj alilande, bona E-isto el VLADIVOSTOK Ĉapajev str. 12-902, SU-690.922. — F-ino Andra PONAVIČIUTÉ (20) pri foto, turismo, sporto, nepre resp. ŠIAULIAI, Bubiai, Litovio, SU-235.442. — Inĝ.-geodeziisto Rein REIMO (36) interŝ. alumet-etikedoj, bk., libroj, PÕLVA Nóudmiseni, Estonio, SU-202.600. — Marian PAULISZYN (2 3) int. literaturoj, lingvoj G, I, muziko. BYTOM ODR. Mlynska 26, PL-67-115. — Edward KONTOWICZ (56) pri ĝen. temoj, volonte kun vilaĝaj ges-anoj. POZNAN ul. Jarochowskiego 95. 7. PL-60-248. — Internaciaj geedzoj Rožé AUKŠTIKALNYTÉ (25) litovino kaj Csaba SZÉKELY (30) hungaro, ktm., pĉt., kol. bk. pri hundoj. BAJA Zsivánovics u. 8. fsz. 2. H-6500.

Marina KOROTJ (25) muzikinstruistino, pri kantoj, popola, klasika, leĝera muziko, eduko de infanoj. KIJEV p.k. 539. 1. SU-252.200. — Ivars BARŠEVSKI (44) ktm., kol. E-periodaĵoj, bk., gm, insignoj. SOVETSK str. Ševčenko 1B-22. SU-238.700. — Geedzoj Naumo kaj Antra KOVNATORS kun diversaĝuloj pri instruado, metodiko, eduko, kol. bk., pm. (hundoj, ĉevaloj), sapo-etikedoj. LIEPAJA Fr. Brirzemilka 24-2, Latvio, SU. — Ĉina bankoficisto Les LO (25) ktm. pri fotado, radio, lingvoj k.a. kol. revuoj, bk., pm., k.a. NEIJIANG (Siĉuan), Renmin-Lu 88, PR-Ĉinio-641000.

KORESPONDI DEZIRAS



LA AŬGURO

Ni citas el HUNGARA ANTOLOGIO la du komencajn versojn de poemo de János Batsányi, en la linioj H.1., V.15. kaj V.33. (ensendendaj). Inter la solvantoj ni lotumos premiojn. Limdato: du monatoj post la apero de tiu ĉi numero.

HORIZONTALE: 15. Vulkana montaro en Soveta Armenio (R), 16. Ŝanĝiĝanta, 17. Estona poetino (Ellen), 18. Aŭreolo, 19. Kapti malamikajn komercajn ŝipojn (R), 20. Malokupi lokon (R), 21. Sledon, 23. Militŝipo (R), 24. Ekstrema flanko, i.a. de kastelo, 25. Ili enhavas dek du monatojn, 26. Mallongigo de doktoro, 27. Tre malofta, 29. Ano de Eŭropa popolaro (R), 30. Fabela besto, 32. Ternuksa planto, 37. Reen: numeralo, 38. Ilo helpanta kapti radiosignalojn (R), 40. Plej malgranda ero de materialoj, 41. Sedimento de glaciriveroj (R) 43. Reen: sin movi (R), 44. Proza fablo enmetita en paroladon, 45. Provizora domo, (R), 47. Meze de decembro!, 49. Fermita kurbo, elipseca, 51. Nederlanda ĉefurbo, 52. ...-ismo: ĉina religia doktrino, 53. Internaj, 55. Samspecaj literoj de foiroj, 56. Havas en la manoj, 58. Komenco de birdo scienco, 59. Skribaĵojn klaraspektajn, 60. Supra parto de aŭtoĉaro, 61. Maljambo (R), 62. Ne malhelpos, 63. Gvidanto de Bulgara Esperanto-Teatro (Kunĉo), 64. Fabela infanmanĝanta giganto, 65. Havi rezulton, 66. Ĝi produktas meñanikan energion.

VERTIKALE: 1. La naŭa litero, 2. Paserforman kantbirdon, 3. Verspiedo, 4. Budapeŝto, Lucerno, Ĥarkovo, 5. Kiel H.52., 6. Partoparto!, 7. Makedona verkisto, aŭtoro de „Ventoj" (Ivanov), 8. Purigiloj, 9. Tiri post si (R), 10. Aero — angle, 11. Reen: korinklin', 12. ... Hodĵa: estinta Albana ŝtatisto, 13. Rivero inter Usono kaj Kanado, 14. Dungita murdisto (R), 19. Multekostan, 20. Reen: el la koro, 22. Rangon montranta rubando sur uniformoj, 23. Vira ceremonia vesto, 26. Teatra verko, 28. Kuŝejo (R), 29. Vasta senarbara ebenaĵo, 30. Substanco de farmacio, 31. Ĝi impresas la flarsenton, 35. Ringoforma koral-insulo, 36. Kreas bildojn en fantazio, 37. Konjunkcio, 39. Persona pronomo, 40. ... Delon: franca filmstelulo, 42. Ronĝulo (R), 44. Ne profesia, 45. Restigados en akvo, 46. Vivovojo al kiu oni celas, 48. Kapablo fari laboron (R), 50. Sur la vojo, 51. Danĝera narkotaĵo (R), 54. Viran veston, 56. Farenda laboro, 57. Estinta Sud-Orienta milita organizo, 58. Favorito de carino Katarina la Dua, 60. Fil' de Adamo, 62. Troveblas en delfeno!, 63. Krude manĝi (R), 65. Monogramo de nia humuristo, 66. Moto.

I.Z.

Solvoj de la krucenigmo enla n-ro 1985/6:

La viv turmentas, sed neniam tedas,
Sola trezoro, kiun ni posedas.
(Marjorie Boulton)

Premion gajnis per lotumado: Jouri KIVAEV, Kiĉier, SU; MEDGYES Béla, Budapeŝto, H; Hans SCHULZE, Wernigerode, GDR.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Márton Fejes

LA DAMO DE L' FATALO
László Tabi

Samtempe kun la prezento dum la 3a Internacia Renkontiĝo de Esperantaj Teatroj (en 1985) aperis ankaŭ libroforme tiu ĉi komedio de la hungara teatra aŭtoro kaj humuristo László Tabi.

1. Kiel nomiĝas la filino de la edziĝema patro?
2. Kio estis la kaŝvorto de la edziĝ-anonco?
3. Kio kaŭzis fine la morton de la patro?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Solvo de la demandoj en la n-ro 1985/6:

1. La sola parenco de Astor Terbanks estis lia nevo.
2. La informon aperigis Daily Mail, Age, Globe, Morning Post, First London Herald kaj tri etaj ĵurnaloj.
3. Paterson estis artisto, imitanto.

(K. Aszlányi: Sep vangofrapoj)

Premion gajnis per lotumado: Hans HOFMAN, Jena, GDR; Elena ŜEVČENKO, Moskvo, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

La verkoj de la sekvaj ekzamenoj:
En la n-ro 1986/3: „Dek prelegoj" de Kálmán Kalocsay; 1986/4: „Vizito de Prezidento" de J. Zawrieyski; 1986/5: „Alta akvo" de I. Nemere; 1986/6: „Urboranda nokto" de Attila József.

Korespondi deziras

Daniel L. MASON, Berkeley, Cal., Usono: Kun danko ni ricevis la foton pri Susana Polgár kun esperantistoj de Berkeley. Bonŝance, el HV vi jam sciis pri ŝi, do kiam ŝi vizitis vian urbon por ŝakluda turniro, kun aliaj esperantistoj vi trovis eblon renkonti ŝin. Pri tiu agrabla okazo jam informis nin ankaŭ Susana kaj ŝia patrino, kiuj estis feliĉaj troviĝi tie en samideana rondo. Ŝiaj brilaj konkuroj en Usono vaste famiĝis pere de la tiea gazetaro kaj televido. Nun ni povas fiere informi vin, ke dum la ĵus okazinta hungara vira ŝakĉampionado Susana — ankoraŭ nur 17 jara — atingis la duan lokon (egalstate kun alia konkursanto) sen malvenko. Ŝi antaŭis aron da eminentaj ŝakmajstroj kaj akiris la rajton — kiel unua virino en la ŝakhistorio! — partopreni la venontan (viran) ŝakĉampionadon inter la plej fortaj grandmajstroj de la mondo.

Jaroslav LISY, Brno, Cs: Gazetoj, avidaj je interesaĵoj, anstataŭ pri Eo inklinas foje publikigi ion pri „alia mondlingvo". Pri la lingvoprojekto de „Romanid" de Z. Magyar ni jam informis en tiu ĉi rubriko (n-ro 85/3), substrekinte, ke tiaj projektoj vole-nevole damaĝas la grandan aferon de IL. Kaj eĉ tiam, se ĝi restas nur en la tirkesto de la inventinto dum jardekoj, sen literaturo, sen disĉiploj, kiel ĉi-okaze. Laŭ via peto ni prezentas almenaŭ unu kolorplenan frazon en tiu hispaneca lingvo: „Le kolorate konchas on trova an fundo de marine bayas." (La kolorajn konkojn oni trovas en la fundo de maraj golfoj.) La lingvoprojektoj Occidental, Interlingua (Gode), Interlingue (Wahl) kaj Romanid estas cetere tre similaj inter si.

Ester KEIL, Nürnberg, FRG: La dudeko da paĝoj en la ilustrita modesta broŝuro RERIGARDO de via E-grupo (la unua en la mondo) ĉarmis nin per la individuaj tonoj de la kontribuaĵoj, raportoj precipe pri la UK en Aŭgsburgo. Estis inde ekkoni la personajn travivaĵojn de viaj grupanoj, la spertojn dum la aktivadoj en la kongreso, kaj aliloke, vizitantaj la vastan, kvankam ne dense loĝatan Esperantujon. Ni konsentas: estus konsilinde — precipe por kongres-aktivuloj — priskribi en same klara stilo kaj distra maniero siajn agadojn por niaj historiistoj, eĉ por niaj „sociologoj". Akceptu dankojn kaj gratulojn pro la brava agado!

Vjaĉeslav HROMOV, Keila, Estonio, SU: Ankaŭ ni havas nenian dubon pri la graveco de bona faterminaro pri la sporta lingvo. Tiucele multe laboris nia iama redakciano, Tibor Újlaky-Nagy, kiu eldonis eĉ „prov-volumon", kvazaŭ enciklopedieton, pritraktantan la sport-terminojn kaj esprimojn (1972). Lian laboron nuntempe revizias kaj grave disvolvas d-ro Árpád Máthé; tion necesigas ankaŭ la plej modernaj evoluoj de la sportoj. Eventuale tiu eldonaĵo aperos en la Jubilea Jaro. Koncerne la novan grandan vortaron H-E ni povas informi, ke tiu, ĝis nun la plej ampleksa, dulingva E-vortaro (pli ol 50 mil kapvortoj) troviĝas jam en „maturiĝanta" stadio, kaj verŝajne dum la jaro 1988 ĝi atingos la publikon. La ĉefredaktoro estas prof. István Szerdahelyi.

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest VIII.
Kenyérmező u.6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
PF. 193. H-1368
Apenas dumonate

XXVI. jaro, 1986 n-ro 2 (126)

ENHAVO

Benczik, Vilmos: Sindikata movado en Hungario 41
Princz, Oszkár: Kulturado en la Esperanto-grupoj 43
Nova Estraro en HEA 45
Baghy, Julio: Hura! 46
Bessenyei, Tibor: Árpád Tóth, poeto de forfluganta ĝojo kaj tristo rezignacia 49
Tóth, Árpád: Vespera lumo-arko (*Imre Szabó*) 49
Tóth, Árpád: Vespera radio-krono (*Márton Fejes*) 50
Tóth, Árpád: Bulvarda aŭroro (*Márton Fejea*) 50
M.F.: Kvardek jaroj de la Belarta Skolo en Baja 51
Benczik, Maria: Junpioniroj jubileas 55
Bálint, Szilárd: La stranga verdikto 56
Clarke, Arthur C.: Supereco (*Endre Dudich*) 58
Korĵenkov, Aleksandr: Legantara Konferenco en Surgut 61
Nemere, István: La trezoro 8. 62
Elektronikaj instrumentoj al la industrio (*Ervin Fenyvesi*) 64
D-ro Nagy, István: Eŭrupa Esperantista Komunumo 68
Recenzoj 72
Fenyvesi, Ervin: Gaja paĝo 76
Fenyvesi, Ervin: Revuo de revuoj 77
Korespondi deziras 78
Krucenigmo, Ekzameno en risko 79
Leterkesto 80

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: Vilmos Benczik * Redakta Komitato: Szilárd Bálint, Tibor Bessenyei, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits. * Ĉefkunlaborantoj: Mihály Gergely, Alfons Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi. * H-1368 Budapest, pk. 193. Telefono: 141-078, 334-194. Eldonas: Hungara esperanto-Asocio. * Respondeca aldonanto: Oszkár Princz. * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) 96,- Ft, al eksterlando 114,- Ft. * Peranto al eksterlando: KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389). Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- USD aŭ egalvalora sumo en alia valuto. * Presis la Presejo de HEA. Indexszám: 25 377 0018-7704.

VIA DOMMASTRO EN BUDAPEŜTO:
BUDAPEST TOURIST

La vojaĝoficejo de l'ĉefurbo

Budapest TOURIST

Uzu niajn servojn

- organizado de grupoj vojaĝoj
- organizado kaj aranĝado de kongresaj vojaĝoj
- organizado de vojaĝoj
- entreprenoj kaj premiaj vojaĝoj
- interpretistaj servoj
- servo de privataj ĉambroj

FERIO+
HUNGARIO=
HungarHotels

Hungara Hotela kaj Restoracia Entrepreno

Ni estas la plej granda Hotela kaj Restoracia Entrepreno en Hungario. Ni estas vaste rekonataj pro la valoraj spertoj, kiujn ni akiris dum la longtempa prizorgo de turistoj. De la malgrandaj familiaj hoteloj ĝis la plej luksaj hotelegoj ni disponas pri 48 establaĵoj dise en Hungario. Vi ĉiuj trovas hungarajn specialaĵojn en niaj altnivelaj restoracioj kaj noktaj amuzejoj, respektive bonan etoson en niaj kafejoj. Niaj kunlaborantoj – 10.000 spertaj fakuloj – volonte staras je Via dispono kaj ili fieras pri Via kontento.
Gastu ĉe ni: HungarHotels

Rezervado:

Budapest V. Petőfi Sándor u. 16. H-1052 Tel.: (361) 183-018, 183-393 Tx.: 22-4923
Budapest VII. Lenin krt. 47. H-1073 Tel.: (361) 228-668, 228-669 Tx.: 22-4696
HungarHotels–Pentatours: Wien, Renngasse 12. A-1010 Tel.: (43-222) 631 249, 663 718 Tx.: 13-6019
HungarHotels en Budapeŝto: Hotel Duna Inter-Continental***** Forum Hotel Budapest**** Hotel Flamenco**** Grand Hotel Royal**** Hotel Budapest***
Hotel Stadion*** Hotel Astoria** Hotel Expo** Hotel Vörös Csillag**
Novaj en 1985: Hotel Béke**** Grand Hotel Hungaria*** Hotel Erzsébet*** **En Vieno:** Hotel Hungaria****

1986 SEP 17